Andrée GAYMARD-ROLLET



# POR TUTMONDA CIVITISMO, LA NECESA CIVITANA EDUKADO

Broŝurservo de S.A.T. – "Laŭte!"

*NIA KOVRILPAĜO : La frigia ĉapo antikve estis la kapvesto de la liberigitaj sklavoj. Dum la Franca Revolucio, ĝi adoptiĝis kiel simbolo de la Libereco...*

*... Libereco, kiun oni devas kare gajni kaj ofte laŭ la jarcentoj rekonkeri. La Francoj pikadis sur sian ĉapon la trikoloran kokardon : la bluo, la blanko kaj la ruĝo iĝis la landaj koloroj.*

*Sur la kovrilpaĝa desegno, tiun landan kokardon ni anstataŭigis per la simbolo de la civitanoj de la mondo por signi, ke pli kaj pli la libereco fariĝos celo por la ĝenerala volo de la popoloj de la mondo.*

El la franca, esperantigis : Daniel DURAND.
Eldonis : la broŝurservo de S.A.T.
Esperanto, F-47470 BEAUVILLE
1990

# ANTAŬPAROLO

## ĈARTO DE LA TUTMONDISTAJ INSTRUISTOJ KAJ EDUKANTOJ

**Antaŭparolo :**

Tutmondista instruado ne celas konformigi homon al la nuna socio, sed ellabori socion por la servo de homo.

Ankaŭ temas pri formado ne de individuoj en nacio, en reĝimo aŭ en religio, sed de membroj en universala komunumo.

Nu, ankoraŭ nun individuo difiniĝas nur per sia naciareco : sennacieca homo oficiale ne ekzistas ; tion pruvas la senpatrujiĝintoj.

La tradicia civitismo identiĝas kun la interesoj de iu nacio malprofite al la aliaj.

Sed tutmonda civitismo identiĝas kun la laŭrajtaj interesoj de homoj sen distingo pri sekso, pri raso, pri socia klaso, pri etno, pri ŝtataneco, pri filozofio, pri religio.

Ĝi atakas ĉiujn antaŭjuĝojn kaj sistemojn atencantajn la homan dignon.

Koncerne la instruadon, ĝis la antaŭa jarcento ĝi utilis laŭ ĉiuj formoj, por prepari eminentulojn kaj estrojn, kaj modli naciistan spiritostaton.

Nun, kiam ĝi okazas, la demokratiigo de la instruado precipe ebligas al la naciaj registaroj, kiuj ĝin kontrolas, adapti morale kaj socie individuon al la interesoj de la koncerna socio.

**Sindevontigo :**

Konsekvence, ni, tutmondistaj instruistoj kaj edukantoj deklaras, ke apartenas al ni per niaj paroloj, niaj skriboj, niaj agadoj :

- sennaciismigi la instruon de historio ;
- antaŭenigi la nocion federaciismo, malbone konata

en la centralizitaj landoj ;

- plivalorigi planedan moralon ;

- denunci ĉiaokaze la socialan maljustecon, la ŝovinismon, la rasismon, la seksan diskriminacion, same kiel ĉian entreprenon kapablan atenci la homan tutecon ;

- esplori ĉiujn solvojn kapablajn malaperigi skandalajn situaciojn, kiuj senigas la individuojn je kuracadoj, je nutrado, je informado, je libereco ;

- progresigi solidarecon je ĉiuj niveloj ;

- ekkonsciigi pri la neceso de efektiva aplikado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj per starigado de tutmonda aŭtoritato kapabla respektigi ĝin ;

- konatigi kaj respektigi la riĉaĵojn de la tuthomara kultura heredaĵo ;

- prepari la infanajn kaj plenkreskulajn spiritojn insiste peti la kreadon de tutmondaj institucioj ebligontaj la kontentigon de la esencaj bezonoj komunaj al ĉiuj homoj, kaj pli aparte tiun de tutmonda institucio por edukado, dotota per plenuma povo, kun la celo ebligi al ĉiu akiri konon kaj kulturon.

Ĉar la transdono de la ricevita scio ne kontentigas nin, ni dediĉos nin al la preparo de la spiritoj, por ke ili komprenu la problemojn starigitajn de la disvolviĝo de la teknikoj kaj de la sciencaj elpensaĵoj ; tiel ili kapablos solvi ilin.

Plene partoprenante en la monda evoluo, ni kontribuos ĉiutage kaj laŭ niaj rimedoj, al ekkonsciiĝo, kiu certigos la respekton de la homa individueco, kaj ni formos mondajn civitanojn, kiuj kapablos labori super la formado kaj la pluado de planeda plureca socio, en kiu ĉiuj estos solidaraj.

# UNUA PARTO

*Mi estas homo antaŭ ol esti franciano, ĉar mi estas nepre homo kaj nur hazarde franciano.* MONTESQUIEU

*Mi kantas Hispanion kaj mi sentas ĝin ĝis medolo, sed unue mi estas Civitano de la Mondo kaj ĉies frato.*
FEDERICO GARCIA LORCA

## ĈAPITRO I

## KIO ESTAS LA CIVITISMO ?

La titolo de tiu ĉi verko povas ŝajni miriga kaj provoka. Pri civitismo, ĉiu scias pri kio temas. Vole-nevole ĉu ĉiu civitano ne plenumas tion, kiam ĝi dediĉas kelkajn horojn el sia vivo por meti balotilon en urnon, aŭ kelkajn monatojn, kiam ĝi plenumas sian soldatservon ? Koncerne la tutmondan civitismon... ne, oni vere ne vidas tion, kio povus esti plie...

Tiujn neestintajn demandojn respondos jenaj paĝoj...

Kaj komence, kelkaj precizigoj pri la senco de la vortoj : la rekte latinida vorto civitismo montras la sintenon de respondeca civitano konscia pri la rolo, kiun ĝi povas kaj devas ludi en la regado de la civito, kies ano ĝi estas; pri ĝiaj rajtoj kaj solidarecaj devoj al grupo konsistanta

el sociaj kaj politikaj strukturoj favorantaj la individuan floradon sine de komunumo, kies ekvilibro estas certigenda.

De la antikva civito, la historia sinsekvo ampleksigis civitismon al pli vastaj grupoj : la nacioj (termino nuntempe ofte samsignifa kiel ŝtato) kaj nun ne plu ekzistas homaj grupoj ne inkluzivitaj en iu aŭ alia el tiuj naciŝtatoj.

De tiam oni povas paroli pri nacia civitismo. Kio origine estis nur praktika rimedo por plifortigi la kunteniĝon de grupo kaj por protekti ĝin kontraŭ la atakoj de la ĉirkaŭa mondo, dum ĉiu konsciis pri sia dependeco de la samkomunumanoj, tio estiĝis moralo multe pli abstrakta sed tiom altruda.

Do la ekzisto de nacia civitismo dependas de la realeco mem de nacio kaj de la konscio de individuo pri ĝia aneco en ĉi tiu (eĉ se nedaŭre ia nacio ne ekzistas laŭ internacia juro, kio ekzemple nun okazas pri la palestina nacio).

Dank'al la lumo de la antaŭaj difino kaj rimarkigoj ni povas paroli pri tutmonda civitismo kaj pri ties necesa ekkonsciigo ĉe tiuj el niaj planedaj kuncivitanoj ankoraŭ malhavantaj ĝin.

Fakte iuj argumentos, ke ekzistas neniu monda komunumo socie kaj politike konsistigita. Pro tio ĉu imageblaj estas rajtoj kaj devoj, kiuj plenumiĝus kontraŭ neekzistanta ento ? Oni apenaŭ povas konsideri tiajn rilatojn, kiam ili plenumiĝus sine de la komunaj interesoj de la internacia komunumo. (Cetere tion provis fari la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, proklamante la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. Sed oni tuj vidas, ke tiu submetiĝo al la internacia komunumo povas okazi nur per la plenumo de la naciaj civitismoj. Tamen estas vere, ke, ĉar la fakto antaŭas la juron - kiel en la antaŭe menciita kazo de la palestinanoj - pli kaj pli preciza, pli kaj pli ampleksa konscio stariĝas rilate al la reala kaj necesa interdependo inter la popoloj de nia planedo kaj la rolo, kiun ĉiu individuo devas ludas sur la monda teatro por antaŭgardi interesojn ligitajn al tiuj de la tuta homaro. Ni diras,

ke la fakto antaŭas la juron, sed ni povas ankaŭ observi, ke - malgrande - la juro ekiras al la agnosko de la tutmonda ento ; tiel atestas la ekzisto de juĝa instanco kiel tiu de la kortumo de HAGO, al kies arbitracio povas apelacii ŝtatoj, kaj ankoraŭ multe pli tiu de la Eŭropa Justica Kortumo, agnoskanta al regnano la rajton peti riparon pro damaĝo kontraŭ ĝi farita de ĝia propra ŝtato.

Ĉi tie ne temas mezuri la malfortojn de tiaj institucioj, nek, interalie, elvoki kiel ilia efikeco malpliiĝas pro la kvazaŭreligia respekto al la naciaj suverenecoj. Kio gravas laŭ ni, tio estas la principo, la pordo malfermetita al la agnosko fakta kaj jura de tutmonda komunumo.

Ni povas do aserti la necesan plenumadon de tutmonda civitismo kaj ties konsekvencon : la necesan edukadon pri tiu civitismo entreprenendan ekde nun. Ĉar hodiaŭ preparigas morgaŭa homo. Pro la akceliĝo de la historiaj procezoj, morgaŭo povas estiĝi tujo kaj la federacia kaj demokratia planeda organizo, kiun ni dezire alvokas kaj kies alveno ŝajnas al ni neevitebla, ne devas surprizi homaron, kies moralo jure kaj politike malfruiĝus. Nun ege tro ofte arkaika moralo, heredita de la deknaŭa jarcento, malfacile akordiĝas kun la rapidegaj progresoj de la sciencoj (interalie biologiaj). La tasko de la nuntempaj edukantoj konsistas ne plu en la transdono de la nuraj ricevitaj scioj, sed en la preparo de la lernantoj kaj disĉiploj, por ke ili solvu problemojn, pri kiuj ni ne konas la ideon mem. Sed por solvi tiujn problemojn - novajn enigmojn - ni devas elpensi simplajn kaj konstantajn kodojn. Tio estas la rolo de la edukado al tutmonda civitismo.

* * *

Ĉu la tutmonda civitismo malsamus de la nacia civitismo, kies neceson ni taksas en niaj demokratioj, aŭ tiel kiel ĝin praktikas - eĉ sen signi ĝin per tiu nomo - tribaj grupoj obeantaj al kutimaj tradicioj, kiuj celas antaŭgardi ilian ekziston ? Jes kaj ne.

Por kompreni tiun dusencan respondon, konvenas pli-

profundigi la esencon kaj karakterizojn de tio, kion oni komprenas per la esprimo "nacia civitismo" kaj pri la devoj, kiujn implicas ĝia plenumado.

Reprenante la difinon, kiun oni trovos lokita fronte de la Ĉarto pri Tutmonda Civitismo (*), ni diru : "Ĉiu civitismo konsistas el la konsciiĝo, fare de la unuopuloj, pri sia solidareco kun la komunumo, al kiu ili apartenas kaj pri la responsoj implicitaj de ĝi je la agada nivelo".

Konkrete, la nacia civitismo sin prezentas sub du aspektoj : la unua, teknika, implicas fare de la civitano, kiu devos alporti sian kunlaboradon al la politika kaj socia vivo de la "civito", sufiĉan konon pri la mekanismoj, pri la strukturoj de tiuj diversaj vivoformoj : formo de regado kaj eblecoj partopreni en ĝi rekte aŭ per transdono de povo - ekzisto de sindikatoj, de senprofitcelaj asocioj, de urbaj aŭ regionaj komisionoj ; lernadaj devigoj ; devo kunlaboradi kun la juĝopovo k.t.p. La tuta vivo de civitano baniĝas en la socia kaj politika teksaĵo de ĝia ĉirkaŭaĵo kaj ĉiu rajto estas kunligita kun konsekvenca devo. El tio rezultas sciaro, kiun ĉiu responsa civitano devas akiri, kaj kiu estas amplekse instruata en la lernejoj. La nocioj akiritaj en la lernado de la diversaj disciplinoj - aŭ priinstruaj temoj - interkompletiĝas, kunmetiĝas : historio, geografio, juro, humanaj sciencoj.

Eĉ la studado de la vivantaj lingvoj - kunigita kun tiu de la koncerna civilizacio - pliriĉigas la spiriton de la estonta civitano, ĉar ĝi ebligas la kritikan komparon.

Ĉiu instrutemo, demetante sian econ, konstruas la konscion de la infano, poste de la maturiĝanto ; ĝi kapabligas ĝin plenumi sian liberan juĝon en la elektoj, kiuj ŝajnos al li la plej bonaj por la bono de ĉiuj. Tio nomiĝas libereco.

Pri la demando scii, ĉu la civitisma edukado devas konsistigi instrufakon, ĝi ricevis laŭ la epokoj - kaj ankoraŭ ricevas laŭ la individuoj - kontraŭdirajn respondojn. Poste mi provos ĝisfundan studadon de la afero, kiam temos pri la dua aspekto de la civitisma edukado, kiun mi ankoraŭ ne pritraktis : la morala aspekto.

(*) Vd. la tekston en aldonaĵo.

En tiu momento, se mi turnas min nur al la teknika aspekto, kiun mi ĵus elvokis, ŝajnas evidente, ke la precizaj nocioj postulataj de la elementa partopreno en la civita vivo ne povas esti akiritaj trafe-maltrafe laŭ legadoj, interparoladoj, aŭ fragmentaj aŭskultoj de aŭdvidaj elsendoj.

La civitano estas insiste petata, kuraĝigata, admonata por meti en urnon balotilon, de kiu parte dependos ĝia estonteco kaj tiu de ĝiaj kuncivitanoj. Ĝi scias, kiel viktimo - aŭ heroo - de pli-malpli lerta balota kampanjo, ke ĝi transdonos parton de propra (*) nacia suvereneco al viro - al virino -, kiu plaĉis al ĝi, aŭ kiu reprezentas politikan partion, kies elektoj laŭkone konvenas al ĝi. Sed ĉu ĝi scias pri kia preciza misio enoficiĝos ĝia deputito ? Ekzemple,en Francio oni neprecize scias pri kio rolas la respublika prezidento kaj la balota maniero - relative simpla - estas proksimume konata. Sed ĉu la balotanto ĝuste scias la rolon de la parlamento kaj pli precize la ekvilibron de la fortoj inter Nacia Asembleo kaj Senato ? Interalie, ĉu ĝi scias, ke pro ĝia elekto de urbestraro, de ĝenerala konsilanto, verdire eble dependos la politika koloro de la dua nacia asembleo ?...

Ĉu ĝi kapablas distingi la regulojn de la laŭproporciaj voĉdonadoj aŭ tiujn de la plimultaj balotoj, disde la voĉdono per neŝanĝeblaj listoj, aŭ per nomaj listoj (nur pri la urbestraraj) ? Ĉu ĝi scias la diferencon inter la nebaloto, la blanka baloto, la nula baloto, kaj pri la konsekvencoj de ties uzo por la balota rezultato ?... Kaj kion diri pri la granda nombro de konsciaj nebalotantoj, ofte ĉirkaŭ 30 % ĝis foje 40 % de la voĉdonantaro ? Iuj ŝtatoj provas malakceli tiujn mankojn, fiksante la balotajn datojn je labora tago dum la semajno ; daŭre la nebalotantoj estas multnombraj. Aliaj faras la voĉdonon deviga; tie malobeo ligiĝas al sankcio. Sed ĉu oni povas kontroli la konsciencojn ? Ĉiuokaze plej malbone estas perforte altrudi ilin, kiel procedas iuj totalismaj ŝtatoj.

La instruado pri ĉi tiuj mekanismoj de la politika kaj administracia nacia vivo ja dependas de la lernejo kaj neniel problemas. Por tio ĉiuj materialoj povas esti bonaj : libro, bildstrio, aŭdvidaĵo aŭ praktikaj ekzercoj pri

(*) Ni ne forgesu, ke naciŝtata suvereneco plenumiĝas je la nomo de la popolo.

ŝajnigo de situacio.

Kaj tiam intervenas la rolo - ŝajne dua-, sed laŭ ni unuaranga - de bone plenumita civitisma edukado, kiu estos ebliganta strukturi iun konsciencon por havigi al unuopulo spiritan amplekson, kiu igas ĝin sociulo solidara kun ties samuloj.

Sed oni ne povas havigi al si tiun konsciencan strukturiĝon nur per la instruado de la leĝoj kaj dekretoj. Necesas morala formado.

Célestin Freinet, franca instruisto, inspirita pioniro de pedagogiaj metodoj nun ankoraŭ ŝatataj, skribis jam ĉirkaŭ la 1930-aj jaroj : "La lecionoj pri civitisma instruado ne plu taŭgas. Pasis la tempo (...) kiam oni povis sin kredi bona civitano, kiam oni parkere konis kaj laŭ hierarkio kaj laŭ funkcio la povajn organismojn" kaj li aldonis, ke ne estas civitisma edukado sen moralo : "Individuo povas esti morala, nur se ĝi estas bona civitano. Kaj la konscia membro de socia komunumo estas nepre morala". (*)

Ĉar ja ne povas esti civitismo sen la subteno de etiko. Tiu etiko baziĝas en la konscio, ke homo ne estas unuopulo sola sur la tera supraĵo, sed ke la pluvivo de la specio mem dependas de ĝia medio ; ke ĝi apartenas al komunumo de estaĵoj, de kiuj ĝi atendas helpon kaj asiston, kaj al kiuj reciproke ĝi devas la apogon de siaj fortoj. La solidareco iel estas ekzistada neceso por homo kaj malobservi ĝin konsistigas krimon - ja kontraŭ aliulo, sed konsekvence ankaŭ kontraŭ la propra memo. Prudente estas tiri el tiuj konstatoj la pozitivajn konsekvencojn por homo kaj dedukti tiujn regulojn por socia vivo, tiun respekton al la ĉefaj valoroj, kiuj funkcias kiel normoj por tiu socio.

Ĉu oni povas diri, ke estus por la homa socio <u>absolutaj normoj</u> ? En tiu okazo, ĉu ni povus ekstarigi universale taŭgan etikon kiel fundamenton de la tutmonda civitismo? Per sia tuto nia studo devus ebligi al ni respondi tiun demandon.

(*) "Morala kaj civitisma Edukado" (Biblioteko de la Moderna Lernejo).

Momente min kontentigos observi la sorton, kiun niaj samtempuloj rezervas al la normoj laŭ mi naciaj (konsentite, ke ili estas tre amplekse adoptitaj de ĉiuj nacioj kun nomata "okcidenta" civilizacio).

Ni nepre konstatas, ke en la moderna mondo de tiu civilizacio malmultaj estas la civitanoj, kiuj kore kaj fakte aliĝas al tiuj moralaj normoj, laŭdire konsentitaj de ĉiuj. En niaj landoj kun tiel okulfrapaj sociaj malegalaĵoj, ĉu la "plej partigita monda virto" ne estas egoismo? Ĉiu deziras ĉiam pli ol ĝi posedas. Kaj se oni ne povas manĝi tiom kiom kvar, loĝi foje en du domoj, samtempe vesti sin per tri manteloj, oni povas akumuli superfluaĵojn por "elekti" laŭ la momento aŭ la fantazio, ŝanĝi, ĵeti, malŝpari. (La Emaŭsaj Kunuloj vivigis generaciojn da mizeruloj per la nuraj forĵetaĵoj en la rubujojn de riĉaj kvartaloj.) Nia nomata konsum-socio estas ĉefe socio kun tentoj, kiu naskas en homo ĝiajn malplej noblajn emojn : envion, ĵaluzon, koleron, malpardonemon. Kompreneble, la plensatigo de tiuj emoj ne okazas sen iu malbona konscienco. Oni serĉas por si pravigojn, kiuj ĉiuj emas malestimi la najbaron : mi laboras pli multe aŭ pli bone ; mi estas fama pentristo, fama artisto, lerta kirurgo... Ĉiuj tiuj valoroj estas monigendaj kaj multekoste ! Kaj la malestimo al la individuoj frue glitas de la samcivitano al la civito. La regantoj, la direktantoj, kiuj, kiel homoj, ne estas ŝirmitaj kontraŭ la malbonaj emoj kaj la malvirtetoj de siaj samcivitanoj, pli ol ĉiuj aliaj estas atingeblaj de tiu envia malestimo. La reĝoj - la princoj, kiuj regas nin - ĉiam estis objekto de prava suspekto kaj la fakto, ke ni estas en demokratio neniel ŝanĝas tiun staton de la aferoj. Ja per la uzo de la balotilo, la civitano povas influi la okazaĵojn, manifesti sian malakordon, fortigi siajn elektojn, sed post la plenumo de tiu devo, la kontentigo de tiu rajto, ĉio ŝajnas eskapi for de ĝi. Super la balotitaj leĝoj ĝi ne plu havas povon, krom tiu de la kolektiva ribelo (surstrataj manifestacioj, kiuj povas naski nur malordon kaj paralizi la registaran regadon) aŭ de unuopula rifuzo, kiu manifestiĝas plej ofte per fraŭdo kontraŭ fisko.

Nun urĝe tempas, ke ĉiu civitano ekkonsciu pri sia necesa solidareco kun la cetera nacio ; ke la pagrifuzanto ĉesu disdiri : "oni ne scias kien iras la mono". Kiu povus nescii la konstruon kaj la prizorgadon de la vojoj, de la malsanulejoj, de la lernejoj ; la socialajn kostojn, la elspezojn por medicinaj kaj sciencaj esploroj ; la medicinan kaj socialan asekuron por ĉiuj - kaj mi preterpasas multe da aferoj - kiuj estas ŝarĝo por la ŝtato, t.e. por la kolektivo ? La unua devo de la civitano estas do rezone konsenti la parton de li pagendan en tiu buĝeto. Ja estas eble al ĉiu malaprobi la elektojn faritajn de la regantoj. Ĉu preskaŭ ĉiuj ne protestas kontraŭ la ĉiam kreskanta monamaso de niaj armeaj buĝetoj ?

Sed al kio do povas utili la kaŝema manifestacio de la malkonsento, kiun konsistigas fraŭdo ? La profitonto finfine estas nur la farinto, kiu neniigas sian rajton pri la titolo "juĝrajtanto". La vera civitista spirito esprimas sin tute aliel : krom pri tiu fama balotilo, ofte tiel malbone uzata, la civitano disponas pri multaj rimedoj por esti aŭdata : unuopa aŭ pluropa klopodo al balotelektitoj (leteroj, petskriboj) ; klopodoj al la amaskomunikiloj, kiuj ofte ne deziras pli ol speguli la ĝeneralajn opinitendencojn ; agado sine de asocioj, de grupiĝoj por la defendo de la kolektivaj interesoj (konsumantoj, ekologianoj, ktp.), aŭ de sindikatoj ; surstrataj manifestacioj, kiuj per sia pli-malpli granda fluo, atestas en la lando pri la graveco de la depostulo. (Kompreneble tie temas pri neperfortaj manifestacioj, kiuj multfoje pruvis sian efikecon, eĉ en totalismaj landoj). Eĉ la proklamita pagrifuzo pri imposto bone efikas. Mi pensas, ekzemple, pri tiu de la pacistoj, kiuj rifuzas doni sian kontribuon al la militarisma strebado de la ŝtata buĝeto. (Notu, ke tie temas ne pri fraŭdo sed pri sankcirifuzo, kiu por efiki estu ligita al ampleksa diskonikado.)

Sed oni povus diri pri la fiska fraŭdo : la malbono estas ĝenerala. Fraŭdas preskaŭ ĉiuj, kiuj tion p ovas; kiu ajn estas la registaro tio estas neevitebla. Tiu onidiro ne estas tiom certa. Kaj tie ekrolas bone pensita civitisma edukado. Se la civitano estos pli bone informita pri siaj devoj al la socio, ĝi iĝos pli honesta. Ne ĉiuj homoj estas malbonaj kaj malofta estas la homo tute malbona. Tial ne

estas vana la okaza alvoko al la publika bonfaremo (donacoj al organizaĵoj por publika higieno, helpo al afliktitaj loĝantaroj pro naturaj katastrofoj). La klarigo de tiu dusenca sinteno probable kuŝas en tiu fakto : la rekta imposto, rekte spertita aspektas kiel manao asignita al sennoma, nepersona ŝuldanto. Nur nia propra abstrakta parto sin devontigas, neniu sentebla kordo vibras je la vido de tiuj baremoj kaj aliaj kontaj kolonoj, kies depostuloj eble ŝajnas arbitraj. Kiu el ni, post la sendo de la liberiga ĉeko, ŝatas pensi "mi faris bonon (aŭ la bonon)", tiel dankante al si pro propra malavaro ?

Pli bone konsentataj (ĉar plejparte nekonataj) estas la nerektaj impostoj, tamen tiom nejustaj, ĉar ili trafas multe pli peze la malgrandajn hejmajn enspezojn, kiam ili koncernas la nepre necesajn varojn. Konstato, kiu plifortigas mian antaŭan analizon. Homo respondas multe pli favore, se oni celas ĝian imagon, ĝian senton.

Sed la bonfaremo rapide malvigliĝas ; ĝi bezonas konkretajn situaciojn, kies kruelecon kaj kuracilon la imago povas ekvidi. La rolo de la civitisma edukado ĝuste estos elvolvi ĉe la civitano la justamon, pli abstraktan nocion, kiu alparolas pli la intelekton ol la koron, pli la racion ol la senton. Tamen urĝe tempas, ke homo estiĝu tiu racikapabla animalo, kia ĝi pretendas esti, ĉar estante la ludilo de sia imago kaj de sia nura sentokapablo, ĝi lasas sin peli laŭ la kontraŭaj ventoj, kiuj igas lin jen entuziasma pro pli-malpli utopiaj celkaŭzoj, jen senkuraĝigita kaj malagema. Dume instaliĝas situacioj, kiuj kapablas mortigi la civilizaciojn, kaj eble la homan specion : paroksismiĝintaj egoismoj, pli kaj pli akraj serĉadoj de materialaĵoj, incitaj luksoj, kiuj najbaras ŝajne senpune al pli kaj pli profundaj mizeroj.

Jen ni estas do denove kun nia diro : necesas instrui la civitismon ; necesas plu kaj ĉiam klarigi ; interalie necesas informi la civitanon pri ties rajtoj. Fakte ĝis nun mi longe pritraktis la devojn de bona civitano, sed mi ne deziras forgesi, ke la plenumo de la civitismo entenas ja rajtojn, kaj eĉ fundamentan rajton, kiu konsistas plenumi sian povon konante la aferon. Mi prenos nur unu

ekzemplon : niaj socioj aroge fanfaronas pri la demokratia reĝimo, kiun ili donis al si, kaj oni volonte rememorigas la faman ekspritaĵon : "La Demokratio ? la plej malbona reĝimo sed neniu estas pli bona". Kaj ĉiu kredas, ke tiu diro kovras evidentan koncepton komunan al la tuta homaro. Nu, nenio estas pli nevera. La substantivo demokratio (regado fare de la popolo) ŝanĝas sian koloron laŭ la adjektivo, kiun oni metas apud ĝin. Kio estas komuna inter liberala demokratio, popola demokratio (admirinda pleonasmo), plimulta demokratio, proporcia demokratio, unupartia, totalisma demokratio ? Rilate al la balotmaniero, kiu ebligas doni povon al reprezentantoj de la popolo, ĝi povas senfine varii sen proksimiĝi, malgraŭ tio, al absoluta justeco. Komence de tiu jarcento, ekzemple, la kontraŭuloj al la universala voĉdonado pravigis sian opozicion tiel : "la voĉdonrajto disdonita al ĉiuj estas absurdaĵo : oni metas je sama nivelo la drinkeman senhejmulon kaj Pasteŭron". (Estas prave diri, ke en tiu epoko, eĉ S-ino Curie ne rajtis pri tio, cetere ankaŭ ne la oficiroj nek la religiuloj...)

Ĉu la tempoj multe ŝanĝiĝis ? Necerte ! En niaj plejmultaj landoj, la enmigrintoj, kiuj tamen grave partoprenas en la nacia prospero, ne rajtas doni sian opinion pri ĝia administrado. Tamen verŝajnas, ke la tendenco al ĉies voĉdonrajto estas pli kaj pli larĝa kaj ne returnebla. Kaj tio estas certe bonaĵo, se la voĉdonanto estas reale informita. Ankoraŭ estas evidentaj malegalaĵoj en la balota maniero adoptita de iuj ŝtatoj. Ĉi tie regas la nombra leĝo : absoluta plimulto, plimulto kun du trionoj (aŭ alia frakcio) ; tie la regulo estas la proporcia (pli-malpli mildigita per la atribuo de la "restaĵoj" aŭ de la "limaj sojloj"). Aliloke oni decidas per ĝenerala konsento ofte utiligata ĉe la internaciaj organismoj. En aliaj lokoj aŭ cirkonstancoj, la baloto okazas per du gradoj (tiel estas elektita la Usona prezidento aŭ la Franca Senato).

Ĉiuj tiuj voĉdonmanieroj entenas indaĵojn, ĉiuj evidentajn mankojn. Se oni kalkulas kun la nebalotantoj, oni neniel povas diri, ke la balotelektitoj reprezentas la tutan voĉdonantaron, sed la perioda reveno de la voĉdon-

adoj ebligas sankcii la erarojn kaj modifi la trajektoriojn. Tiel la ondumanta kuro de la ŝtatoŝipo povas esperi desegni la kurbon de la progreso.

* *
*

## ĈAPITRO II

## AL KIU KONFIDI LA CIVITISMAN INSTRUADON ?

Al tiu demando tuj venas facila respondo : "civitisma instruado estas la afero de la prilerna institucio". Plej ofte tuj sekvas la konsekvenco : "la civitanoj ne havas civitisman spiriton... La "junuloj" havas tiom da malvirtoj... tial ke ne plu estas civitisma instruado en lernejo."

Ne perdante tempon por montri la mankon de reala informado, kiun signas tiu lasta diraĵo - ĉar la sekvo de tiu studo nuligos ĝin - mi deziras tuj reaserti, ke la lernejo ŝajnas al mi fakte la plej konvena loko por tia instruado.

Ĉefe formante la junajn spiritojn, kiuj estas konfiditaj al ĝi, ĝi neniel povas forigi tiun devigon.

Tamen du demandoj sin prezentas. Ĉu oni povas - devas - tute sin malŝarĝi sur ĝin pri tiu eduka misio ? Kaj ĉu ĝi estas en la plej bona pozicio por plenumi tion ?

Unue, respondante la duan, mi rimarkigos, ke la propraj strukturoj de la lerneja mekaniko pledas por neado : la lerneja instruado distranĉas scion, kun la espero, ke la sumo de la tranĉaĵoj konsistigos, lernfine, kunteniĝan tuton da konoj. La samo okazas pri la formado de la konscioj. Sed sur ambaŭ kampoj oni povas timi, ke la spuro estos malmulte profunda.

Tamen, ĉar la civitisma instruado celas tiel elvolvi ĉe la infano moralan konscion kiel doni al ĝi la konojn

necesajn por la ekzerco de ĉi tiu dum ĝia civitana vivo, ĝi ne povas konsisti nur en memorigo. Ne temas lerni regionan topografion aŭ algebrajn regulojn. Ĉi tie la eduka medio estas influa, kaj ne neante la lernejan formadan rolon, ni devas atenti pri la multnombraj influoj, kiuj efikas sur la formataj spiritoj : la familio, la kamaradoj, la legaĵoj, la komunikilaro... La tuta socia reto estas koncernata kun siaj fadenoj jen samcelantaj, jen kontraŭaj, aranea retaĵo en kiu baraktas - kaj foje pereas - la freŝa konscienco de la homido. Pro nia antaŭzorgado konsekvence oni tendencas serĉi per kiaj rimedoj pezi sur tiuj diversaj eroj, por ke ties influo ne kontraŭu, ne detruu la laboron pacience ellaboritan en lernejo.

Tuj parenteze : en la sekvanta prezento ĉiam mi turnos min al la ekzemploj alportitaj de la t.n. okcidenta civilizacio, ĉar niaj legantoj radikas en ĝi kaj ĝi staras - kaj ofte imponis - kiel lumturo de universala civilizacio.

En niaj socioj, la familio ankoraŭ restas la plej konvena loko por la formado kaj edukado de infano. La plej ĵusaj sociologaj kaj psikanalizistaj laboroj abunde demonstris tion. Sed ĉu la familio ne emas ĉiamigi la malegalaĵojn, la diferencojn, kontraŭ kiuj ribelas nia justeca sento ?

Iu Ĝenerala Direktoro Prezidanto de societo, iu konstrumanlaboristo, iu instruisto, iu kuracisto havas komunaj nur tre malmulte da tiuj "fundamentaj bezonoj", kiuj determinas la elektojn de vivo kaj referencajn valorojn proponotajn al iliaj idoj. La nuntempa socio ne estas homogena korpo kaj la moralaj tradicioj oftege estas nur ujoj malplenigitaj je sia esencaĵo.

Ĉu la lerneja instruado konfliktiĝos kontraŭ la familio? En multaj okazoj, jes ja. Des pli grava estos la konflikto, ke ĝi estos subtera, ke en lernejo oni instruos teorian moralon, kiun tute ne praktikos la familio. Mi reparolos pri tio.

Notindas ankaŭ, ke la sama konflikto okazos, kiam temos pri influo de komunikiloj (kino, sed ankoraŭ pli la

televido) al la junuloj.(*)

Sed oni povus sin demandi, koncerne tiujn tradiciajn valorojn, kiujn ankoraŭ gloras la lerneja instruado : ĉu la nuntempa socio praktike parte forĵetas ilin pro tio ke ili ne plu respondas al la mora evoluo, same kiel tiuj leĝoj necese forlasitaj aŭ transformitaj por konformigi la juron al la novaj kutimoj ? (ekzemple, mi pensas pri la antaŭkontrolo de la naskiĝoj per la kontraŭkoncipo, konsiderita kiel krimo antaŭ malpli ol duonjarcento kaj nun leĝe permesita).

Necesus do, antaŭ ol ŝarĝi iun per la instruado de tiuj "valoroj", konsideri ilin laŭ la nuntempa konscienco (kaj ni vidos tion pli fore, lasi diskutata la evoluon de la konsciencoj).

Antaŭe ni rimarkos, ke la etiko, al kiu referencas la laikaj instruado kaj edukado, estas amplekse heredita de religiaj filozofioj. En niaj okcidentaj societoj, la judo-kristanisma etiko profunde markis la moralajn principojn proponatajn al infanoj kun dogma valoro. Mi proponas kiel ekzemplon la principon "amu kaj respektu viajn gepatrojn" rekte devenantan de dia ordono (**) : "viajn gepatrojn vi honoros". Same oni povus citi la geedzan fidelecon, la respekton de la vivo de aliulo (krom okaze de laŭrajta memdefendo), la respekton al la posedaĵo...

Poste ni rimarku, ke aliaj religioj predikis la samajn principojn : oni trovas similan mesaĝon en la Korano, la Talmudo, en la instruoj de Budho, de Konfuceo ktp... Ĉu tiom da koincidoj ne pruvas, ke ekzistas konstantoj de la homa animo kaj de ties aspiro al la Bono, kiujn ne kapablas forviŝi la devojigoj truditaj de tiuj al ilia propra religio : la praktiko de la inkvizicio aŭ la ekscesoj de Ĉario

(*) Vd. de la aùtorino, la mimeografitan tekston (nur france) de la prelego "Aùdvido kaj Edukado" (Instituto por Tutmondanistaj Studoj - sesio 1980.

(**) Laù la kristana tradicio, temas pri la dek leĝoj diktitaj de Dio al Moseo sur monto Sinajo.

ne nuligas la noblecon de la instruado farita de Kristo aŭ de Mahometo : Kurbo estas neniam konstanta sed farita per altoj kaj malaltoj.

Mi parolis pri konstantoj. La graveco troviĝos por ni en la serĉo pri kio determinas ilin : ĉu sociaj, ĉu kulturaj fenomenoj aŭ profunda bezono de homo por certigi la pluvivon de ties specio ? La unuaj valoroj ne postvivas socian ŝanĝiĝon, moran evoluon, ekonomiajn malordiĝojn; la dua restadas neŝanĝebla.

Tiel ni povos rimarki, ke eĉ dum la ŝanĝegoj alportitaj de la du lastaj mondmilitoj en la politika kaj ekonomia monda organizado, same kiel en la konsciencoj, la samaj bazaj principoj regadis la moralan elvolviĝon konsideritan dezirinda por infano : obeado unue al la gepatroj, poste al la estroj. Ni jam diris tion, tiu maksimo estadis proponita kiel leĝo de la naturo, kiun foje oni konsentis pravigi atribuante al la unuenaskitoj la meritojn de la scio kaj de la sperto. (*)

Tiel konsistiĝis forte hierarkiigita socio, kie generacion post generacio transdoniĝis la observendaj reguloj de vivo.

Nun ĉar oni klopodas veki la kritikemon ekde la frua infanaĝo, ĉar la scio universaliĝis kaj demokratiiĝis, ĉar junulo ofte scias pli ol siaj gepatroj, tiu junulo ne plu respektas la respektindaĵojn.

Ĉe ido de drinkema patro la respekto al patro malaperis, anstataŭite de la malestimo kontraŭ la drinkulo.

Sammaniere ne plu sufiĉas, ke politikulo sin vestas per la senatana talaro por ŝirmi sin kontraŭ la severaj juĝoj faritaj pri lia korupto aŭ lia karierismo. Kaj kvankam la perforto praktikata de la armeo trudas al la soldato ŝajnigan respekton al la estroj, la murmuroj kaj sar-

(*) Cetere tiu obeado ne estis formala : ĝi apogis sin sur la prirespekta dogmo "viajn gepatrojn vi honoros"...

kasmoj ne mankas en la dormoĉambregoj kontraŭ la figradulo aŭ la estinta kadukulaĉo. Nun oni ne plu cedas antaŭ la simbolo de la kostumo aŭ de la pompo, ĉiam oni serĉas sub la vesto "la nudan reĝon", de kiu oni postulas la akordon inter la agoj kaj la paroladoj. Oni malakceptas la hipokritecon, oni konsentas admiri nur la admirindaĵojn. Pro tiuj kialoj oni observas de la malplej kritikemaj spiritoj ĝeneralan diskuton pri ĉiuj modeloj ĝis nun sendiskute tiel akceptitaj : diskuto pri nia civilizacio de la reĝomono ; ribelo kontraŭ la ŝokaj malegalaĵoj naskitaj de ĝi ; kaj foje revolucioj ; malakcepto de la falsaĵoj, kiu sukcesigis la ekologiistajn movadojn kun la ekscesaj konsekvencoj (tiu "reveno al la natura vivo", kiun publike laŭdegis iuj el niaj junaj sesdekokmajuloj kun la kreo de efemeraj komunumoj, aŭ ankoraŭ la provo de kampara aŭ paŝtista vivo, kiu por multe da ili fandiĝis pro la fajro de la kamparaj realaĵoj) ; (pravigita) defendo de la rajtoj de la subpremitaj aŭ ofendmokitaj minoritatoj : reveno al la fontoj, serĉo de kultura identeco, kiuj same povis degeneri en ekscesajn batalojn kontraŭ la laŭdire lingva kaj kultura koloniismo de la alcentrigaj ŝtatoj.

Tiel iras la pesila vekto, sed ĝiaj osciloj al la negativa aspekto de la okazaĵoj, sed la ekscesoj, la eraroj ne povas kaŝi la grandegajn akirojn, kiujn la svarmado de ideoj en tiuj lastaj dudek jaroj alportis al la homa konscienco. Kaj tiujn akirojn la tutmonda civitismo devos kunporti por ebligi al la homeco finfine eliri el sia besteca gango.

* *
*

Ni vidis, ke la tutmonda civitismo nun ne ekzistas sur la politika tereno. Certe estas do, ke paroli pri tutmonda civitismo estas elvoki la rajtojn kaj devojn sine de latenta civito, la planeda civito, kies politikaj strukturoj respondantaj la dezirojn de la tutmondistoj nepre estos demokratiaj kaj federaciaj. Tiu organizo ebligos al la tutmonda ŝtato montriĝi respektema al la kulturoj kaj la kredoj de la federaciitaj grupoj, kun kiel komuna denominatoro la respekto de la fizika kaj morala tuteco de ĉiu homo.

Esplorkomisiono de la Mondcivitanoj, kunligita al CREPEM (Esplorcentro por Tutmondisma Edukado) longe prizorgis difinadon de la valoroj, kiujn la tutmonda civitismo devus elvolvi.

Kiel konkludo de ĝiaj laboroj estis ellaborita la teksto de ĉarto por tutmonda civitismo (*), kiu pri pluraj punktoj kompletigas la Universalan Deklaron de Homaj Rajtoj.

La aŭtoroj de la ĉarto signalas ekzerge : "La tutmonda civitismo... ŝajnas nepre necesa al la plena elvolviĝo de homo", tiel ili prezentis ekde la komenco la fundamentan principon de la unuaranga respekto de la fizika kaj morala tuteco de ĉiu homo. Kiel, fakte, imagi la aktivan partoprenon en la vivo de la civito (planeda aŭ nacia) fare de individuo kun fundamentaj bezonoj ne kontentigitaj ?

Ŝajne tiel antaŭzorgis la redaktintoj de la Universala Deklaracio. Ĉe la 3-a artikolo oni povas legi : "Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco." kaj por plibone precizigi, la 25-a artikolo deklaras : "Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la propraj sano kaj bonfarto kaj tiuj de ĝia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj."

Oni tuj vidas, kie la ĉarto pri tutmonda civitismo disiĝas de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ja ne temus rifuzi al homo eĉ unu el la rajtoj al ĝi agnoskitaj de ĉi tiu ; tute male la dirmaniero aspektas nesufiĉa kaj makulita de tia neefikeco, kiun UNO senĉese montris ekde sia naskiĝo. La plej frapa ekzemplo pri tio laŭ mi aperas en la jam citita 3-a artikolo : "Ĉiu havas la rajtojn je vivo..." Sed ĉu oni antaŭvidis provizi al ĝi la rimedojn praktiki tiun rajton ? Interalie, ĉu oni permesas al ĝi ne partopreni en la militoj, kiujn proklamis ĝia propra nacio ? Siaflanke la ĉarto pri tutmonda civitismo malimplice diras : milito kaj torturo estas krimoj kontraŭ la homaro... La rifuzo kontraŭ soldatservo... ĉia neperforta

(*) Vidu la kompletan tekston en aldonaĵo.

lukto povos esti starigitaj kontraŭ ili."

Sendube naive estus opinii, ke, fine de la plej vasta kaj plej mortiga konflikto ĝis tiam travivita de la mondo, iuj spiritoj, eĉ sindonemaj kiel tiu de René Cassin, estus povintaj malhonore signi tion, kio estis, laŭ ĉiuj, la unu-nura rimedo por solvi la internaciajn konfliktojn : la milito.

Sed post kvardek jaroj, la interŝtataj rilatoj ne progresigis la tutan homaron pri tio, tute male.

***

Pri la kontentigo de la homaj fundamentaj bezonoj, ni devas fakte esti vigle atentaj, kvankam sciante, ke ne estos facile starigi normojn kaj ankoraŭ malpli pretendi trudi ilin ĉie.

Ĉapitro de la Tutmondisma Sumo substrekas la kompleksecon de la problemo : "Necesas kalkuli kun iu relativeco en la daŭro kaj la spaco. La prienergiaj bezonoj de la Eskimoj kaj tiuj de la Tuaregoj kompreneble ne estas samaj, kvankam eblas determini por ĉiu homo : nombron da kalorioj, proteinoj, lipidoj kaj vitaminoj necesaj". Sagaca rimarko ne tro eksterpolenda, per aplomba aserto, ke sub simila klimato riĉuloj kaj malriĉuloj ne havas la samajn bezonojn. Certe ja terpoma dieto povas antaŭgardi iun kontraŭ la morto pro malsatego, sed ne certigos la plenan elvolviĝon de ĝiaj fizikaj kaj spiritaj kapabloj. Kaj ĉar ni nun scias, ke la prinutraj mankoj estigas ĉe la juna infano ("ĉio estas determinita je sesjara aĝo") nekorekteblajn intelektajn malordojn, kiom da timo ni povas koncepti por la morgaŭa homaro, por la pluvivontoj el tiuj milionoj da malsatantoj de nia epoko ?

Alia manko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj devas maltrankviligi nin : tie estas neniu aludo al la danĝero, tiu de la difektiĝo de la naturmedio, kiu minacas la tutan homaron. Pri tio la formulo povintus esti : "rajto eviti la malrapidan detruon pro fizika degenero". Certe la aŭtoroj de la Deklaracio ne povis imagi - malmulte post Hiroŝima - la disvolviĝon de la nukle-

aĵoj kaj la terurajn danĝerojn, kiuj minacas nin per ĝia civila aŭ militista uzo.

Nu - ĉar la tuto estas kunligita - neniu el la problemoj, kiujn mi ĵus menciis, povos solviĝi je la nacia ŝtupo aŭ en la internacia koncerto de la ŝtatoj. Ni ektuŝas ĉi tie tutmondajn problemojn, kiuj povos solviĝi nur per supernaciaj leĝoj, kiuj estos nur la spegulo de konsciiĝo (*) de la tutmonda popolo pri la realeco de ĝia aparteno al la planeda civito.

Laŭ tiu ĉi vidmaniero la projekto de ĉarto por tutmonda civitismo konsideras ankaŭ kiel krimojn kontraŭ la homaro :
- "la malŝparadon de la naturaj riĉofontoj kaj de la produktaĵoj de la teknikoj (...)
- la persekuton de la individuoj pro ties politikaj opinioj
- la militon kaj la torturon... la fabrikadon kaj vendadon de militaj armiloj oni metu sur la saman nivelon kiel ilian uzon."

* * *

Do mi ĵus priskribis kelkajn specifajn kampojn de la tutmonda civitismo. Aliaj estas pri kiuj mi klopodos precizigi la situacion en 3-a parto, sed antaŭ ol daŭrigi, ŝajnas al mi necese kontraŭi eblan misinterpreton de la antaŭaj paĝoj. Mi ne deziras fakte, ke oni tiru el la kritikoj formulitaj de mi kontraŭ la malfortaĵoj de UNO definitivan kondamnon. Estas tro facile "ĵeti la infanon kun la banakvo".

Nu, kiaj ajn estas niaj forsilentadoj kaj nia progresdeziro, ni ne povas nei la feliĉan influon, kiun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj apogita de la Ĉarto de UNO estigis sur la evoluo de la internacia socio de antaŭ kvardeko da jaroj. Al UNO pere de ties filioj kaj de la re-

(*) Ĉar la leĝoj estas nur la traduko de la konvinkoj de iu socio, starigitaj por antaŭgardi la ordon, kiu ŝajnas utila por ĝia pluvivo.

komendoj de la Ĝenerala Asembleo, ni ŝuldas multajn progresojn : malkoloniadon, pli grandan protekton de la virino kaj de la infano, progreson de la skribinstruo, sociajn leĝojn, batalon kontraŭ la rasismo... mi preterpasas iujn, sed mi ne forgesos mencii ankoraŭ, ke UNO faciligis la kreadon de neŝtataj organizaĵoj, kies influo en la mondo ne estas neglektebla.

Kiel veraj transnaciaj organizaĵoj, en sia funkciado ĵaluze sendependaj de la naciŝtataj povoj, ili ofte rolas kiel kontraŭpovoj kontraŭ iliaj ekscesoj.

De nun la plej grava malhelpo restas la netuŝebleco de la absoluta ŝtata suvereno. Kontraŭ tiu fortikaĵo sin turnas interalie la tutmonda civitisma edukado.

Fakte la konsciiĝo pri la devo de planeda solidareco, kiun ni deklaras nepre necesa, ne sufiĉos en la nuna internacia organizo. Nur supernaciaj organismoj (aŭ institucioj dotitaj per povoj limigitaj je la propraj kompetentoj, sed realaj - en atendo de federacia organizo de la planedo) ebligos la ĉesigon de la homa ekspluatado fare de aliaj homoj aŭ fare de ekonomiaj aŭ politikaj kolektivoj ; la respekton de la naturmedio necesan al la pluvivo de nia specio - kaj ties konsekvencon : la ĉesigon de la malŝparo de planedaj nerenovigeblaj riĉofontoj ; kaj ĉefe la ĉesigon de la militoj ĉiam senutilaj, damaĝaj en siaj konsekvencoj, ruinigaj por la batalantaj regnoj, por la ekonomioj, estigaj de ĉiaj funebroj. Kaj tie la tutmonda civitisma edukado, pro siaj celoj kaj rezultatoj, disiĝas, superante ĝin, de la nacia civitisma edukado.

Plie, la tutmondisto, edukanto aŭ civitano (sed ni diris tion : ĉiu civitano sindevige estu edukanto) ankoraŭ dum kelka tempo, devos kuraĝe stariĝi kontraŭflue al la ĝis nun akceptitaj ideoj koncerne la militon, la landan defendon, la fabrikadon kaj la vendadon de armiloj ktp.

Ankoraŭ ĉi tie mi devas esti klara : for de ni, tutmondistoj, la opinio, ke onia lando, onia patrujo devus esti forlasita al la malbona vento de la militistaj invadoj. Sed ni havas plurajn argumentojn starigotajn kontraŭ la

simplaĉaj sintenoj de la "se vi deziras pacon, preparu militon".

1-e. La ekonomia minaco, kiu nun ŝvebas super niaj landoj, estas multe pli reala ol tiu de militista okupado ; nu nek kanonoj nek raketoj antaŭmalhelpos la unuan.
2-e. Se la nacioj, kiuj pretendas sin "lumoj" de la okcidenta civilizacio, konsentus al defendo de la paco eĉ malgrandan parton de la penoj dediĉitaj al la militista defendo, ili povus enoficigi Paco-ministron (*), kies tasko ne estus okazigi rezignon antaŭ invadanto, sed esplori interalie per kiuj rimedoj, per kiuj konsentoj pri limigoj de la naciaj suverenecoj, finatingi la urĝan kreadon de tiuj supernaciaj organizaĵoj, kies neceson mi ĵus demonstris, kaj kiuj, por solvi la konfliktojn, anstataŭigus militon per arbitraciaj procesoj.

La dua atribuo de nia mita Pacoministrejo devus esti krei Esplorinstituton pri la neperfortaj protektado kaj civila defendo (**). Kiom volonte ni jesus al kunlaborado, al simbiozo, inter la ministroj pri paco kaj pri edukado.

Anstataŭ formi civitanojn senhezite kaj senmezure obeemajn al la barbaraj ordonoj de militestroj, oni formus virojn kaj virinojn konsciajn pri siaj devoj, memrespondecajn, en kiuj elvolviĝus la plej altrangaj homaj aspiroj : kuraĝo, oferemo al idealo agnoskita justa. Ĉar la neperforteco malgraŭ la diroj de ties kritikaĉantoj - ofte pro miskono de ĝi - neniam estas malagemo ; ĝi postulas samtempe kiel la plej egan firmecon fronte al la maljustaĵoj fare de la kontraŭulo , la neabomenon al ĝi, kiu estas respektinda pro ĝia homeco, eĉ se ĝi estas devojigita.

(*) Postulo de la Mondcivitanoj, ignorita de la politikaj povoj preskaŭ en ĉiuj landoj (krom eble en Kostariko).

(**) Ni ne revu : ankoraŭ longtempe estos perfortaj konfliktoj kaj se la "saĝeco" de niaj registaroj antaŭgardas la tutan homaron kontraŭ nuklea ruiniĝo, la kanonoj ne silentiĝos tiom frue ! Aliflanke tutmonda federacia organizo ne transformos la homan specion en ŝafidaron aŭ apostolaron. Same kiel iu premdevigo (fare de polico) longtempe necesos por malhelpi kromajn provojn, same homgrupoj sendube provos trudi siajn vidpunktojn aŭ perforte daŭrigi sian povon.

Fine estas lasta argumento, pri kiu fanfaronas la porpledantoj de la formado kaj do de la militista servo de la junuloj. Tiu lasta, ili diras, realigas vastan socian miksadon, samtempe kiel ĝi okazigas rompon - ofte la unuan - kun la familia medio... (Tiel la militista servo estas tie konsiderata kiel la inico, ia paŝo al plenkreskula vivo).

Malrekte jen reprezentataj al ni la bonfaroj de la milito ; oni konas la rekantaĵon : progreso de la teknologioj, de la kirurgio, de la medicino ktp.

Feliĉe por la tuta homaro, ni povas proponi ion pli bonan : ne neante la meritojn de tia socia miksado, ni proponas, ke la militistan servon anstataŭu civila servo, kiu, hodiaŭ nacia, povus tre rapide estiĝi transnacia. Knaboj kaj knabinoj estus devigitaj al ĝi, laŭ siaj propraj kapabloj kaj gustoj. Ne mankas naturaj katastrofoj : tertremoj, superakvoj, lavangoj, malsategoj, kie la gejunuloj povus trejniĝi por efektiva solidareco, kie la energioj, la kuraĝo, la sindonemo elvolviĝus. Ankoraŭ pli simple, laboroj por publika utileco, la helpo al malsanuloj, al maljunuloj, al sociaj malavantaĝuloj, naskus en ili la responsan senton.

***

## ĈAPITRO III

## IUJ METODOJ DE CIVITISMA EDUKADO

Mallonge en la ĉapitro II mi indikis, ke edukado pri civitismo ne povas esti la privilegio de la lernej-institucio, kvankam ĉi tiu amplekse rolu pri la temo. Grave ŝajnas al mi nun precizigi per kiaj metodoj ĝi povos ludi sian rolon. Ni devas, mi opinias, firme forĵeti la ideon de pura kaj simpla enmemorigo de reguloj parkere deklamotaj kiel multiplika tabulo. La katolika eklezio longe provis instrui la kateĥismon per la aŭtomata recito de respondoj al neŝanĝeblaj demandoj. Mi ne scias, ĉu la nombro da kredantoj per tio kreskis, sed du faktoj dubigus nin pri tio : la esprimo "reciti sian kateĥismon" estiĝis aĉigaĵo por montri la neinteligentan manieron elflugi argumentaron, pri kies ĝusteco oni malmulte kredas, kaj aliflanke la uzon de tiu kateĥismo forlasis la moderna katolika instruo profite al la historio de la religioj kaj al ĝusta kompreno de la moralaj valoroj de la kristanismo.

La civitisma laika instruado do sin gardu refali en netaŭgajn praktikojn, kiuj atingus - kiel jam antaŭe - nur la steriligon de la instruado. Tamen vere estas, ke iuj precizaj konoj estas akirendaj. La politika kaj socia landa organizo estas nur la kodigita traduko de la evolupunkto de socio. Tre gravas, ke ĉiu civitano bone konu ĝin, aŭ por "eniri la ludon" kaj ties regulojn respekti, aŭ por provi

transformi ilin, se ĝi taksas ilin kadukaj aŭ malbonaj.

Nur per perfekta kialokono de la funkciilaroj regantaj la nacian kaj internacian vivon iu civitano kapablos aktive kaj response partopreni en la pritema landa organizo. Rifuzi sian partoprenon en la landa politika vivo, krom pro nescio, konsistigas sintenon de malforteco kaj foje de malkuraĝo. Bone komprenita civitisma edukado valorigos la vorton "politiko". Politiki estas senti sin koncernata per la vivo de la "polis" - de la civito - kaj ligita per la decidoj faritaj por flekseti ties destinon.

Tro longe oni kredigis, en niaj landoj, ke "la politiko estas malpura", ke nur la senpolitikulo povas resti pura. Tiel, artisto, verkisto, aktoro, altnivela sportulo emas sin teni "super la konfuzbatalo" ; ili forgesas, ke ilia sindeteno mem estas politika elekto - kulpa, ĉar ĝi rifuzas la responsojn. Plej mirige estas aŭdi tiujn senpolitikulojn kritiki regantojn, kiujn neniel ili malhelpis akiri la povon. Ili vere mirus, se oni dirus al ili, ke uzi aŭtovojon, malsanulejon, lernejon, estas politikaj agoj, kiuj igas ilin ŝuldantoj rilate al socio, al kiu ili ne rajtas malkonsenti sian solidarecon.

Aŭ ankoraŭ, kion ni diru pri la sinteno de ĉampiono, kiu lokas la sporton "super la politikon". Ne gravas por ĝi, ke la Rasapartigado, moderna lepro de la tuta homaro, plagas en Sudafriko : ĝi malkonsentos la bojkoton de la "sportaj ludoj" tie aranĝitaj kaj tiel donos al la lando la tutan brilecon ligitan al la ludoj. Ĝi forgesos, ke ĝia homa devo, de planeda civitano, estas ĉiam kaj ĉie protesti kontraŭ tiaj praktikoj, specife do laŭte malkonsenti ĉian koluzion kun krima registaro.

Tiel ni fine konstatas, ke praktike neeble estas disigi la moralan disde la teknika aspekto de la civitisma edukado, kaj ke la lerneja rolo estas precipa.

Nun ja metiĝas la demando : ĉu do necesas restarigi la moralajn lecionojn kaj civitisman edukadon de la unua duonjarcento ?

Mi multe mirus, ke la spertintoj konservus pri ili laŭdegan memoron.

La kursoj pri Moralo, kiuj sin apogis sur la komento de maksimo belege skribita de la majstro sur la nigra tabulo kaj kiun poste ni devis reprodukti sur la skribopaĝo (alia timiga afero !) ; la lecionoj pri civitisma edukado tute senpersonigitaj, kiuj vicigis la regulojn de la administra kodo pri la komuno, la departemento, la parlamento, sed kiuj, sin proklamante senpolitikaj - evitis klarigi la elektojn de la grandaj partioj kaj la verajn problemojn de la lando. Tiel ekstremen iris tiu aseptigo de la edukado, ke estis konsiderata skandala la fakto, ke junulo enlernejigas "la ĵurnalon". (Ĉe la hejmoj oni ne pli favoris ties legadon). Tiel la tiama vivo ŝajnis al la lernanto tiel malproksima kiel la mezepoka, kaj tiel malloge ekkonebla kiel la "problemo de la Turka Imperio" kara al la historiistoj kaj penige memorebla !

La tempoj ŝanĝiĝis. Vivo, laŭ siaj multaj formoj, eniras la plej modestan hejmon per radio aŭ televido (ĉu oni ne scias, ke la irana revolucio kontraŭ la ŝaho estis telegvidita el Franclando fare de Ayatollah Ĥomeiny pere de paroladoj registritaj sur sonbendoj sekrete distribuitaj en la plej malproksimaj lokoj ?)

Niaj infanoj estas do pretaj interesiĝi pri la "lecionoj", kiujn iliaj instruistoj povos alporti al ili, kondiĉe, ke tiuj instruistoj sukcesu igi ilin vivantaj, t.e. proksimaj al la reala vivo.

Jen ni estas preskaŭ rekondukitaj al la Sokrata pedagogio. La majstro, irinte malsupren de sia piedestalo, estiĝas gvidanto al la kono, kaj ĝi pliriĉiĝas, pliriĉigante siajn disĉiplojn. Kaj tial ke la civitisma instruado celas precipe la elvolviĝon de la civitaneco per praktiko, ni komprenigos al la lernanto la sencojn de la utileco, de la kialo de la leĝoj kaj reguloj de ĝia lando. Ĉar tiu verko ne estas pedagogia traktato, mi ne insistos pri la multnombraj rimedoj, kiujn la instruistoj disponas por vivigi kaj komprenigi sian instruadon, mi faros nur du sugestojn.

La unua estas, ke de nun la instruado - kiel la edukado - puriĝu el ĉia hipokriteco. Unu el la homaj dignoj konsistas en la rajto esti konsiderata kiel responsulo kaj tio nur veraĵo estos prezentata al la lernanto. Ja la instruanto estos libera pri siaj komentoj (ĉar ankaŭ ĝia propra vero estas respektinda), sed ĝi devos prezenti ilin nur kiel komentojn kaj tiel diskuteblaj.

Mia dua propono estas jena : Kial la lernejo ne estiĝus la unua civitismejo ?

Abstrakta leciono pri la malbonaĵoj de la perforto malmulte interesos la infanon kaj ĝi estos forgesanta ĝin, tuj kiam ĝi transpasos la klasĉambrajn murojn. Ĝi multe pli bone asimilos la ekzemplon de ĉiutaga arbitracio por solvi la malkonsentojn. Tiu latenta perforto ĝin ĉirkaŭanta, same kiel la minaco de puno, kiu subite sankcias agon, kies eraron ĝi ne ĉiam agnoskas, ofte signas nur edukan malagemon kaj instruistan aŭ gepatran nepovon por restarigi situacion, kiun longe ili lasis difektiĝi. Mi ja vidas miajn legantojn levi la ŝultrojn. Iuj diros: "ĉiu bone scias, kien kondukas ĉi-fake la emo ĉion permesi, en kiu nia epoko dronas !"

Ĉar ĝuste estas abismo inter la edukado, kiun ni rekomendas kaj la senenergia forlaso, kiun reprezentas la kontraŭaj polusoj : blinda disciplino kaj permesemo. Tian fosaĵon ni retrovas en la diferenco inter armita civila defendo de nacio kaj neperforta defendo - kaj ĝuste tie situas la rolo de bone komprenita civitisma edukado.

La plej bona preparo al ĉi-lasta devas komenciĝi en la klasĉambro kaj la paŭzkorto : tie oni kutimigas la infanon vortigi siajn konfliktojn, t.e. eksterigi siajn sentojn. Manke de tio, ofte la infano konfuze maltrankviliĝas, ĉar ĝi dronas en sterilaj kontraŭemo kaj malamikemo, kiujn ĉiu elreviĝo, ĉiu malakordo nur kreskigas.

Tute male, se la estonta civitano sukcese komprenis la kialon de la leĝoj kaj regularoj de sia lerneja mikrokosmo, se tiel oni sukcesas sociemigi ĝin, multe pli facile ĝi transigos la neceson pri tio al la tuta socio.

Fine, ĉiam per sia ĉiutaga sperto, pli facile ĝi komprenos la diferencojn, do ĝi akceptos ilin.

Kion iuj konsideras kiel katastrofon, la rasa diversigo alportita en niajn lernejojn pro la ĉeesto de idoj de enmigrintoj, tio tute male konsistigas bonŝancon por nia instruado.

Pri tiu temo, estas eduka fako, kiun oni tro subtaksis dum longa tempo - ĉar laŭ la elitismo de niaj antaŭuloj unuacis la intelektuloj - kaj kiu devus estiĝi unu el la plej fortikaj kolonoj de nia konstruaĵo : mi celas la sporton. Kiu alia agado povus pli bone elvolvi la plej bonajn inklinojn de homo, sociema besto ?

Kaj jen aperas en nia esploro kategorio de edukantoj ŝarĝitaj per gravaj responsoj. Ĉu la praktikado de sporto ne estas - same kiel la lango de Ezopo - kapabla je la plej malbona kaj je la plej bona ?

Kontroli la homan agresemon anstataŭ glori la perforton, disvolvi la teamecon, ne permesante la ŝovinismon, favori la konkuran fervoron sed ne la gloramon, ekzalti la virtojn plej profitajn al la individuo kaj al la socio : kuraĝon, harditecon, bonkorecon, ĝojon de la senprofitcela peno... estus longe, listigi la bonfarojn de disciplino, kiu, formante la korpojn, povas, se bone kondukita, forĝi ankaŭ la animojn.

Prefere, ni aŭskultu fidindan eminentulon pri edukado, S-ro M'BOW (eksa Ĝenerala Direktoro de UNESKO). Li deklaris, parolante al la ĵurnalistoj de la sporta gazetaro (*) : "per sia tuja komprenebleco kaj per la renkontiĝoj, kiujn ĝi okazigas inter la individuoj, la sporto povas alproksimigi la homojn kaj prepari la popolojn, por ke ili kune vivu en etoso de toleremo kaj de reciproka ŝato (...) La ĉampionoj ofte konsentas fariĝi publikaj herooj, esti cititaj kiel ekzemploj (...) Tio povas en la plej bona okazo favori la kamaradecon, lojalecon, respekton al aliulo same kiel ĝi povas, en la plej malbona okazo, favori la mallarĝan naciismon, eĉ la ŝovinismon."

Tiel ni povos nur aplaŭdi la freŝdatan deklaron de iu

(*) Okaze de la 60a datreveno de la Internacia Asocio pri la Sporta Gazetaro.

franca ministro pri edukado : "La nunaj programoj, li diris, provizas multajn okazojn eduki la lernantojn (...) La civitisma kaj morala edukado estu ĉiam unua-eca zorgo de ĉiuj edukantoj, kia ajn estas la instruitaĵo. La sento de la kolektiva intereso, la neceseco de la reciproka interhelpo, la malegoisma agado kaj la rifuzo al perforto ĉeestu per ĉies sinteno. Tiu lernado de la civitismo kaj de la respekto al la persono ebligas batali kontraŭ la agresemo, kaj informi la lernantojn pri la paco. Same la artisma edukado kaj la studado de la lingvoj estas rimedoj por aliri la diversajn kulturojn ; ili plenumas tiun edukadon (...ebligantan) al la lernantoj la akiron de funde esploritaj konoj pri la aliaj landoj (...) la programoj pri historio, pri civitisma edukado kaj pri filozofio kapablas estigi la pripenson de la lernantoj (...) La instruistoj povas amplekse elvoki siajn demandojn en la kadro de la interdisciplinaj agadoj (...). La edukado al paco tiel enskribiĝas en la kadro de la civitana formado."

Do ja ekzistas tiu civitisma edukado fare de la lernejo - almenaŭ en la registaraj direktivoj. Nu, de kie venas, ke la plimultaj demanditaj gepatroj bedaŭras ties foreston ? Eble simple tial, ke ĝi lasas nur spuretojn en la junula sinteno.

Kial ? Laŭ mi pro du esencaj kialoj : la unua koncernas tiun lernejan formadon "en la kadro de plurdisciplinaj agadoj", kiuj ŝajnas ne sufiĉe ekspluatataj.(*)

Ne dezirante enfermi la instruistojn en kadron nekonsenteblan por ilia juĝolibereco, tamen oni konstatas, ke la direktivoj esprimitaj en la ĉi-antaŭa deklaro ŝajne estas pli ĝuste nura deziro kaj lasas eblaj ĉiujn interpretadojn - eĉ ĉiujn mankojn. Tiu unua konstato kondukas al alia : mi ŝatus, ke la programoj pri civitisma edukado estu pli metodaj, pli koheraj, ne lasu senlumaj iujn el la grandaj tuthomaraj problemoj ; mi ŝatus, ke ili kal-

(*) Mi turnas min ĉefe al la instrumetodoj praktikataj en Francio. Kompara studo de la sinteno de aliaj landoj estus ege interesa.

kulu kun la tutmondisma pripenso por superi la kadron de la internaciismo - eĉ bonintenca.

En Aldonaĵo oni trovos koheran pristudan programon, per kiu la adoleskantoj povus havigi al si konojn nepre necesajn por ilia formado kiel planedaj civitanoj. Kompreneble tio estas nur ekzemplo pri kio oni povus atenti. Ĝia merito estas la kohero. Necesus determini la vertikalan (laŭ la aĝoj) kaj horizontalan (per la interdisciplineco) dispartigon de la akirendaj konoj kaj de la pripenso, kiun tiuj konoj devus naski. Ni deziras, ke fakaj komisionoj estu kreitaj por tiu esploro.

Sed komence mi diris tion : la responso pri la civitisma edukado ne estu atribuita nur al la lernejo, ĉar la individua personeco formiĝas el la tavolaro demetita de la medio.

La familio do estas ĉefe koncernata, tial ke ĝi estas ankoraŭ en la plej multaj nunaj socioj la baza ĉelo, kie elvolviĝas la homido. (*)

Sed plie necesas, ke ankaŭ la gepatroj estu ĝuste informitaj, kaj kapablaj formantoj (**). Tiam ekrolas parametro.

Ankaŭ la gepatroj - la plenkreskuloj - rezultatas el edukado. Ili povas transdoni nur kion ili ricevis de siaj propraj gepatroj, de la lernejo, sed ankaŭ de la socia teksaĵo ĉirkaŭvolvanta ilin. Tiu teksaĵo pli kaj pli efikas sur la nuna plenkreskulo. La konstanta formado - konscia aŭ ne, vola aŭ ne - estas fakto. Kaj tiu efikado estas tiel

(*) Pri tiu temo interese estas rimarki, ke malsukcesis la provoj fare de la soveta socio por senposedigi la familion pri ĝia eduka rolo profite al la Ŝtato. Pro la forto de la tradicioj nun la infano estas redonita al siaj genaskintoj ; la avinoj ofte anstataŭas malpli multekoste la vartejajn oficistojn.

(**) Tiu observado plifortigas nian pripenson, ke urĝas de nun disvolvi ĝeneralan ekkonscion pri la interdependeco de la homaj estaĵoj kaj de la valoroj kapablaj favori ilian harmonian kunvivadon sur la Terglobo.

grava, ke ĝi povas detrui la malfortan konscienckonstruon konsistigitan dum la infanecaj kaj junulecaj jaroj. Antaŭlonge, kiam la spackomunikaj rimedoj estis malmultaj, la individuo malmulte ŝanĝiĝis : vilaĝanoj aŭ kamparanoj transdonis preskaŭ senŝanĝaj la tradiciojn, la farartojn kaj pensmanierojn hereditajn de la gepatroj. La eleksteraj informoj alportitaj per la ĉiutaga ĵurnalo, kiu iris de familio al familio, nutris la malrapidan pripenson kaj malmulte transformis la opiniojn. Nun la militoj, la amasa elmigrado necesigita pro la bezono trovi eksterlande nutraĵon, kiun la naska grundo ne plu kapablas provizi, aŭ - en la plej bona okazo - la eblecoj malmultekoste vojaĝi, ĉio favoras grandegan miksadon de la spiritostatoj. Koncerne la aŭdvidilojn, ilia influo ne plu estas priskribota.(*)

Ĉie laŭte oni postulas la veron pri informado, kaj ni estus la lastaj por nei la bezonon. Sed ni devas noti ankaŭ la danĝerojn pri ekscesa informado, kiu naskas alkutimiĝon aŭ senton pri senpoveco (fronte al la ripeto de similaj bildoj de malfeliĉo kaŭzita de militoj kaj malsategoj ; fronte al la amplekseco de la malordo). Same estas la politikaj diskutoj, kie produktiĝas supersate gurditaj la samaj argumentoj refutitaj per la samaj kontraŭargumentoj... Oni bone komprenas, ke la "televidulo" sin trovas antaŭ dilemo : "ĉu tro malmulte aŭ tro multe?" Laŭ mia opinio, ne estas universala recepto. Ĝi mem libere devas elekti je la lumo de sia propra etiko kaj de la reagoj de la spekttantaro. Cetere tia sinteno estu tiu de ĉiu responsulo : scienculo, kuracisto, edukisto ktp...

Por fini pri la temo de la aŭdvidaj komunikiloj, ŝajnas al mi, ke nun ne estus troa postulo peti de la televidestroj pli viglan konscion pri responsoj. Fakte, se ĉiu povas elekti la verkon, kies legadon ĝi proponas al siaj gefiloj, la filmon, kiun ĝi vidigas al ili, ne estas same pri la tele-

(*) Vidu, kiel elvolviĝon, la mimeografitan tekston de la prelego farita ĉe Instituto por Tutmondismaj Studoj, 1980-sesio : "Amasaj komunikiloj kaj nova tutmonda ordo".

vido. Surprize ĝi eniras vian hejmon. Kiam vi ŝaltas vian aparaton pro la vespera ĵurnalo, kun via tuta familio, vi ne povas antaŭvidi, ke komentisto kompleze longe priskribos, kaj ofte per bildoj, la detalojn de seksperforto, de homorabo, de monoŝtelo. Kiel protekti junan infanon kontraŭ la traŭmatiza bildo de sangokovrita viktimo de vojakcidento ? Same, ĉu estas barbaraj la gepatroj, kiuj malpermesas la spektadon de elsendoj laŭdire "porinfanaj", en kiuj estas glorita nur la perforto ; en kiuj la konfliktoj ĉiam estas solvitaj per la milito ; en kiuj ĉiam ĉefas la leĝo de la pliforta ?

Tamen ne estas pli bona ilo por konstanta edukado ol tiu "fenestro malfermita sur la mondo". Nur al ni apartenas fari ĝin la preferinda ilo por la civitana formado. Al ĝi necesus unue rigora morala kodo por la manipulantoj de la ilo (analoga al tiu mastranta la medicinan profesion). Poste aperas necese, ke la plenaĝa uzanto konsciiĝu pri siaj propraj respondecoj, pri siaj rajtoj, sed ankaŭ pri siaj devoj ; ke ĝi kreu aŭ aliĝu asociojn analogajn al tiuj defendantaj la konsumantojn de materialaĵoj. Ĉi tiuj sukcesis post kelkaj jaroj sanigi la merkaton de la riĉaj landoj, prizorgante la komercan honestecon, protektante la financajn interesojn kaj la fizikan sanon de la aĉetantoj. Ĉu la morala sano de kreskanto estus malpli altvalora ol ĝiaj visceroj aŭ ĝiaj pulmoj ? Urĝas, ke naskiĝu gepatraj kaj edukantaj grupiĝoj, kiuj metos sin je la dispono de la aŭdvidaj komunikiloj por kritiki kaj proponi koncerne la elsendaĵojn proponatajn al la junularo. Tio favorus ĉe ili la necesan konsciiĝon pri la starantaj problemoj.

# DUA PARTO

## LA GRAVAJ TEMOJ DE LA TUTMONDA CIVITISMO

En la antaŭa studo mi elvokis la problemojn, kiuj koncernas la homan tutecon kaj la valorojn, sur kiuj devus sin apogi ĉia civitisma edukado bone komprenita. Sed evidentas, ke tia blokeco ne povus sufiĉi : Nun ekzistas sur nia planedo tiom da kutimoj, tiom da malsamaj kredoj, kiuj ne povas reduktiĝi al unu el ili.

Estis la eraro de la koloniistoj (de la samtempuloj de Pisar aŭ de Mahometo ĝis la konkerantoj de la XIX-a jarcento) sin kredi tenantoj de ekzemplaj civilizacio kaj religio kaj ŝarĝitaj per civiliziga misio ĉe la konkeritaj popoloj. La tuta mondo nun pagas tre multekoste tiun konvinkon, kies konsekvencoj pezis sur la malkoloniado mem. Necesos multe da bonvolo kaj klarvido por ripari la damaĝojn, kiujn suferas nun aparte la Ekonomie Submetitaj Landoj. (*)

Problemoj malfacile solvotaj staras do antaŭ ni ekde nun. De ilia justeca solvo plejparte dependos la sorto de la morgaŭa mondo. Ilia kono estas nepre necesa al la nuna edukanto, kiu devas proponi ilin al la pripensado de la estontaj mondcivitanoj.

Mi ne perdos tempon pri la temo de supernaciaj insti-

(*) Tiu termino ŝajnas al ni pli ĝusta ol "Elvolviĝantaj Landoj".

tucioj aŭ de monda federacia strukturo, kiuj ŝajnas al ni necesaj ; ilin abunde traktis bonegaj tutmondistaj verkoj, same kiel tiun de la malarmado (**), tie mi dezirus nur malfermiĝi la pripensadon en tri kampoj esencaj por la planedcivitana edukado : la respekto de la kulturoj, al kiu estas ligita la skribinstruo ; la ekonomia organizado de la Mondo kaj la demografia demando.

(**) Interalie mi citos :

- de Louis Perillier : "La Planeda Patrujo", "Morgaŭ la Tutmonda Regado", "La kontrolo, ŝlosilo de la malarmado".
- de Théodore Pontzen : "Kiaj Pacoj ? Kiel ?"
- kaj la ĉapitroj de la "Tutmondisma Sumo" : Volumo II : Tutmonda Federaciismo. Transformiĝo de la milita industrio en pacan industrion, kaj la tuta Volumo III.

## ĈAPITRO I

## LA RESPEKTO AL LA KULTUROJ

Post la erao de kultura malestimo, kiu trafis la koloniitajn popolojn, en ĉiuj internaciaj medioj nuntempe estas proklamata la neceso de la respekto al la kulturoj. Kompreneble la tutmondistoj subtenas tiun proponon.

Sed okazas, ke la aplikado de la principo ne estas tiel simpla kiel la formulo lasas kredi tion.

Kaj unue kion celi per la vorto "kulturo" ? Sen iu dubo: la tuton de la sociaj strukturoj, de la tradicioj en la kampoj de la intelekto, de la artoj, de la teknikoj propraj al regiono, al nacio, al regiona grupo, al etno. Ĝi inkluzivas la "familiajn kaj seksajn rilatojn, la manieron de manĝado, de vestado, de dancado, (...) la monumentojn kaj la florajn kunmetadojn, la psikologian vivon kaj la politikan vivon (...), la buŝan kaj skriban lingvon"(*). Ĉiu kulturo estas la produkto de renkontiĝoj inter klimato kaj memoro.

Ja niaj modernaj socioj traktis la kulturon kiel konsumvaron(**). Bildaj artoj, literaturo, muziko estas objektoj

(*) Carlo Fuentes (en Unesko-informo nº70).

(**) "La Kulturo de Aliuloj" - Hugues de la Varenne (Seuil-eld.)

de komerco tiel skandala kiel tiu de la vetkura sporto. Tamen tie estas unu el la maloftaj kampoj, kie kunfandiĝis en blokan tuton la spirita heredo de la homoj de ĉiuj landoj. Velasquez, Beethoven aŭ Michel-Ange ĉesis en la spiritoj esti hispana, germana, itala, por estiĝi nur "Princoj de la Artoj" kaj iliaj verkoj - plejparte dank'al la klopodoj de UNESKO - nun estas taksitaj kiel "tuthomara komuna heredaĵo".

Tiu multforma heredo malrapide konsistigis la kulturon de la popoloj alirintaj al ĝi. Ĉar ĉiu kulturo nepre naskiĝas el miksiĝo. Tiu fenomeno estas tiel malnova koncerne la kulturon de nia malnova kontinento, ke ni malmulte konscias pri tio. Ĝi aperas multe pli klare, kiam temas pri la Latinamerika kulturo, en kiu kunfandiĝis indianaj, iberaj kaj afrikaj popoloj kaj kutimoj. "La kunfandiĝa kaj transformiĝa procezo, skribis la venezuelano Arturo Uslar Pietri, disvastiĝis al ĉiuj aspektoj de la vivo. Nenio povis pure kaj simple esti adaptita sen iuj difektiĝoj, iuj modifoj pro la interagado de la tri kulturaj heredaĵoj kaj de la geografia medio"(*).

Nun ne estas alie pri la miksiĝo de la loĝantaroj de la elvolviĝantaj landoj aŭ pri tiu de la migrintaj laborantoj en la riĉaj landoj. Tamen tiuj du situacioj estas nete diferencaj de tiu ĵus elvokita kaj starigas malfacilajn problemojn, pri kiuj ni devas serĉi solvojn.

Koncerne tiujn du lastajn grupojn, pro la nuna fenomeno de historia akceliĝo, la malrapida kunfandiĝo (indianamerika tipo) de la estintaj jarcentoj anstataŭiĝis per fulma kolizio de la mensoj pligravigita pro la ekonomie superreganta pozicio de la okcidenta civilizacio. En multaj okazoj, temis pri vera malrespekto al la konsciencoj : la enlanda kulturo estis forĵetita aŭ neita. La inklino estas nun haltinta, sed multaj problemoj staras, ne pro la malhelpa volo de iuj aŭ de aliaj. Tiel, koncerne tion, kion oni nomas ĉe ni "la migrantoj de la dua generacio" : ĝenerale ili adaptiĝis ekde sia frua infanaĝo al la duobla modo de familia kaj lerneja vivo kaj - ofte - al la dulingveco.

(*) Informilo de UNESKO, februaro 1978.

Maturiĝinte, ili devos elekti aŭ trovi sian mezan vojon.

Koncerne la evoluon de la elvolviĝantaj landoj, la problemo estas multe pli kompleksa kaj malfacile solvebla. Por prezenti ties donitaĵojn, mi amplekse utiligos la verkon de Hugues de Varenne, jam cititan, kaj tiun, tre bone klarigan, de E. de Rosny "La okuloj de mia kaprino" (*) Post la elvoko de la ordinaraj kutimoj, kiuj faras kulturon, kie la familia unueco estas tiel homogena, ke oni kredus vidi ununuran korpon : mirigan bildon de la "afrika socia strukturo", la verkinto montras kiom la Eŭropanoj estas fremdaj al ili ; ankoraŭ pli, kiom ili ignoras ilin ; pro tio ilia simplaĉa konkludo : "la nigrahaŭtuloj ne posedas propran kulturon (...) krom siaj servistoj, kun normigitaj refleksoj, la blankhaŭtulinoj sin batas kontraŭ la bagatele zorgemaj poŝtoficistoj kaj kontraŭ la diversaj vendistoj de artaĵoj. Koncerne la edzojn, ili revenas el la laboro tedegitaj, (siadire) pro la inerteco de siaj dungitoj kaj la nekompetenteco de siaj afrikaj direktoroj. Oni resendas al ili nur senbrilan spegulon de ilia civilizacio (...) En tiaj kondiĉoj ĉu estas eble atingi la konon de la kulturo de aliuloj (...) Per tiu termino mi ne signas la luksan ŝaŭmon de civilizacio, sed la tre apartan spiriton de iu popolo, neatingebla."

Kaj la verkinto aldonis :

"Kiel eduki la junulojn, ne konante la bazojn de ilia kulturo?" Tie fakte estas la tuta problemo. Kiom multe da eraroj faritaj kun la plej bonaj intencoj en la mondo, kiam oni volis senkodigi tiun afrikan kutimon, aplikante al ĝi la normojn de la okcidenta sinteno.

Tiel estas pri la psikanalizo, kiu de antaŭ kelkaj jardekoj ebligas pli profundan konon de la Eŭropano. Laŭ Marie Cécile kaj Edmund Ortigue (**) : "la rilato inter la naskiga patro kaj la filo ne estas pripensenda laŭ la rilata skemo propra al Eŭropo. En Afriko la ludoj de la identiĝo

(*) "Les Yeux de ma chèvre" (france) kolekto "Terres humaines".

(**) "L'Oedipe Africain" (La Afrika Edipo).

kaj de la kontraŭiĝo de la filo al la patro inklinas sin direkti al la fratoj. Ĉar la patro reprezentas la prapatran idaron, li estas neatakebla."

Trafa rimarko, kiam temas pri netuŝita civlizacio, sed tuj kiam estiĝis la froto kun la okcidentaj kutimoj ĉio komplikiĝas, kiel ankoraŭ observigas de Rosny : "Ĉu la interparolado estas ebla inter estro rigorema pri la tradiciaj valoroj, sed nelerta por sin esprimi per la franca, kaj tiuj junuloj, kiuj malsukcesis sian eniron en la modernan socion, sed tamen ne reirus piroge fiŝkapti? (...) La konfliktoj naskitaj pro la alkulturiĝo tie paroksismiĝis. Ili travivas tendencojn de moderneco kaj de tradicio tiel miksitajn, ke ili estas nekapablaj distingi ilin."

La situacio estas ankoraŭ pli kriza ĉe la enurbiĝinta parto de la popoloj, ĉar "se la enlernejigita knabo, antaŭ patro favora al la moderna vivo, kondutas simile al eŭropa adoleskanto, la laboristo riskas sin trovi en nestabila situacio : "Li enskribiĝis en sindikaton... Li esprimas sin kiel juna laboristo de Boulogne-Billancourt(*). Nesenteble li malproksimiĝas de la tradicia socio por adopti vivmanieron, en kiu li povas kalkuli nur pri si por sukcesi. Tiu ŝanĝiĝo ne venas de pripensita elekto, sed de serio de malgrandaj praktikaj decidoj, kiuj kuntrenas lin en la granda moderneca fluo."

Tiu situacio ne estas tute fremda al ni. Dum pluraj generacioj, junaj kamparanoj, kiuj vizitis la francan lernejon, spertis tedan senton similan al la malestimo por la nekulturo de la gepatroj, kiuj parolis nur dialekte. Tiuj lastaj sin volvis en sia agresema ofendiĝo. La tradicioj transformiĝis en folkloron taŭgan nur por distri kelkajn turistojn...

La tendenco supervenkigi la regionajn lingvojn kaj tradiciojn estis reago de intelektuloj, kiuj, riĉaj de la du

(*) Laborista urbo apud Parizo.

scioj - reveno de la balancilo - volis supervenkigi tiun de siaj ĝepatroj ekskluzive de ĉio alia (en Korsikio, en Bretonio, en Alzaco ktp...)

*

Fronte al la malfacilo solvi tiajn kontraŭdirojn, kiel la tutmondisto devus konduti ?

Unue, per la aŭskultemo kaj moderigo de siaj juĝoj, per la respekto al la diferenco kaj al la identeco propra al ĉiu individuo, kiu prave rekonas sin en lingvo, filozofio, religio, neniel altrudante aliĝon al aliuloj. Tiu sinteno nomiĝas toleremo.

Tamen toleremo posedas limojn. Simpla estas ties difino, la sojlo estas la konsento de la praktikoj, kiuj atencas la propran bazon de nia etiko, ekzemple la barbaraj inicaj ritoj, kiuj implicas la eltranĉadon aŭ kudradon de la knabinaj seksorganoj, kripliĝo same fizika kiel psika.

La planeda civilizacio, provizita per la respekto al la homo, ne povos konsenti la ĉiamigon de tiaj kutimoj kaj se ties elradikiĝo povas prezenti en tuja estonteco malfacilaĵojn, ĉar ĝi kontraŭas al solidaj tabuoj, almenaŭ ĉiuj niaj penoj devas strebi al ĝi (*). Kiel ankoraŭ skribas E. de Rosny : "La tempoj ŝanĝiĝis, la NGANGA(**) ne plu povas sin apogi kun la sama sukceso kiel antaŭlonge sur aro da signoj kaj da kredoj, al kiuj li persone plu aliĝas, sed kiujn ne plu tiom intense partoprenas ĉiuj liaj klientoj". Kaj ĉi tiuj pli volonte konsultas ĉe la distrikta malsanulejo pri gravaj malsanoj.

Sed la fervoruloj de la okcidenta civilizacio ne triumfu pro tio, ĉar paralele kun tiu movado al la okcidentmaniera scienca spirito ekvidiĝas ĉe ni vera allogiĝo al la ko-

(*) UNESKO iniciatis tiukampe noblan konsciigan laboron kun la helpo de pluraj neŝtataj organizaĵoj aparte interesitaj per la virina situacio.

(**) Resaniganto, kiu konas la sanigajn medicinojn same kiel la bonefikajn praktikojn.

noj de afrikaj aŭ aziaj medicinaj praktikoj. Eĉ se bezone oni serĉas kaj foje trovas la racian pravigon.

Nun okazas granda miksado de ideoj ; la homo estos pli memfida antaŭ la sekretaj fortoj de la naturo, se ĝi igos siaj la pozitivajn akirojn de ĉiuj civilizacioj.

## ĈAPITRO II

## SKRIBINSTRUO

La analfabeteco estas problemo strikte ligita al tiu de la respekto al la kulturoj kaj al la fizika kaj mensa tuteco.

Estis unu el la plej noblaj strebadoj de la kolonia erao favori la enlernejigon de la enlandaj loĝantaroj. Ja ne forestis la sento pri civiliziga paternalismo. La kulturo instruita, la lingvo, estis tiuj de la okupanto. Per la instruo de la historio - pro tio ofte ŝercmokita - la juna afrikano lernis, ke ĝia "prapatro la gallo" estis kun blonda kapharraro kaj bluaj okuloj. La parolaj kulturaj tradicioj enlandaj estis ignoritaj aŭ ridindigitaj - aŭ traktitaj kiel nuraj folkloraĵoj. Samtempe oni predikis evangelion al la bonaj sovaĝuloj. De post la dua mondmilito la evoluo estis fulmrapida. Unuflanke, la organismoj devenaj de UNO - la diversaj filioj - klopodis helpi la milionojn da analfabetoj de la globo eliri el sia nescio (la UNESKO-programo por skribinstruo estas unu el la plej koheraj kaj kompletaj), aliflanke, oni kuraĝigis la koncernajn landojn memrespondeci.

Ja la rezultatoj ne ĉiam estis laŭ la esperoj. Oni travivis malsukcesojn aŭ nedaŭrajn efikojn. Sed dank'al la

sperto, la lecionoj ricevitaj devas utili. El tio evidentiĝas por la nuna civitano de la mondo iuj simplaj ĉefaj principoj :

Unue, sin demandi pri la celoj de la skribinstruo. Certe komence kuri al la plej urĝa : ebligi al ĉiuj globloĝantaroj eliri el la izoleco, en kiu ilin restigas la nura parola tradicio kaj aliri al la transdono de la konoj, kiuj eble plibonigos ilian vivon (lerno de teknikoj, inico al la simplaj higienaj reguloj unue, alireblo al la sano poste). Kaj ni ne taksu kiel preterlasindan tiun feliĉon, kiu estis al ni donita de antaŭ jarcentoj, ĉiam plu lerni, plilarĝigi, per la skribokono, la kampon de niaj renkontiĝoj kun la aliula spirito.

Konsekvence vasta skribinstruo ebligos al la plej malfavorataj loĝantaroj de la malriĉaj kontinentoj aliri al sia propra kulturo. Carlos Fuentes tre bone diras (*) : "La kulturo de Latina Ameriko tiom avida pri moderneco, posedas tradicion. Se ni ignoras tiun tradicion, ni riskas estiĝi la rubejo de la industria malŝparo : eksmodaj televidaj serioj, eksvalida teknologio (...) estas disdonitaj tre malmultekoste al ni". Tiam li demandas : "Kial verki en kontinento, kie la analfabetoj estas tro multnombraj ? Kaj ĉu nun skribi ne estas la sola maniero por komuniki kun tiuj, kiuj iam ne plu estos analfabetaj kaj tiam rajtos peti niajn voĉojn?... Ni opiniis, ke ni ne rajtas verki poemon aŭ romanon ĝis kiam ne plu estos infano mortanta pro malsato en la brazila Nordesto. Kaj ĉu nun verki, en Latina Ameriko, ne estas la nura maniero doni alian nivelon, alian reliefon al tiu teritorio konstanta de nia civilizacio, senĉesa ĉeesto de potenca popola kulturo? (...) Ni bezonas scii tion. Niaj vivoj dependas de tio, ĉar se ni ignoras nian pasintecon, ni devas aserti, ke ĉio, kio estis daŭrema en niaj socioj, estis konstruita de fantomoj kaj ke ni mem do estas fantomoj."

Post la agnosko de la celoj de la skribinstruo, ankoraŭ ni gardu nin kontraŭ la pasintaj eraroj ; necesos ĉiam

(*) jam citita artikolo.

pensi, ke "nenio estas por ĉiam akirita al homo". Signus ĉi tion, inter aliaj pruvoj, la grandega nombro da plenaj analfabetoj malkaŝitaj en niaj landoj dum la enkorpusigo de la junaj rekrutoj. En lando kun deviga lernado (kaj ĝis la 16a jaro!) centmiloj da junuloj scipovas nek legi ĵurnalon, nek skribe respondi simplan demandaron.

Skribinstrui ne konsistas do en la fakto surŝuteti per la kono pri iuj magiaj signoj la cerbojn de junaj kaj plenaĝaj generacioj. Tio implicas konstantecon de formado. Necesas en ĝi multe da konvinko, multe da obstino kaj relative multe da mono.

Kaj nature tie estas la problemo : estas tiom da unuaecaj aferoj plenumendaj, tiel ĉe la lokaj registaroj kiel ĉe la interncia organizaĵoj... "Tiom longe dum estos unu infano mortanta pro malsato...". Konsentite. Sed la homa elpensemo estas senlima. Mil malmultekostajn rimedojn pri instruado oni povas ĉiutage trovi kaj provi. Necesas la konvinko esprimita de Pastro Duran (*) : "Ĉiuj fakoj de la ŝtato, la komunumoj, la unuopuloj, la tuta popolo devas partopreni en tiu strebado : la skribinstruo estas civitana devo."

(*) UNESKO-Informo n°793 (1983).

## ĈAPITRO III

## LA EKONOMIAJ PROBLEMOJ, ŜLOSILOJ POR LA ESTONTECO

Dum la antaŭa pritraktado ni vidis, ke ĉiuj homaraj malfacilaĵoj nun okazantaj estas pligravigitaj - eĉ foje naskitaj - de la mono. Estas pri la ŝtatoj same kiel pri la unuopuloj : la disvolviĝo, la firmeco, la sekureco, la vivteno dependas de la enspezoj. Kruda Nacia Produkto, komerca ekvilibro estas pri tio la ŝlosil-vortoj. Ŝuldiĝo, prezaltiĝo, malkresko, estas minacoj super la naciŝtatoj kaj la popoloj, kun, kiel individuaj konsekvencoj, la labormanko, la mizero, la malsano, la malsato, la ribelo, la krimkvanto... Mi preterlasas iujn !

La plej atentemaj spiritoj de antaŭlonge rekomendis la starigadon de tutmonda nova ekonomia ordo. La temo eĉ fariĝis kvazaŭ la "kunkrema kuko" de multaj kunvenoj kaj diskutoj, sed ĝis nun neniu inter la plej elstaraj ekonomiistoj de nia planedo reale proponis la rimedojn por tiu ŝanĝiĝo. Koncerne la ekonomiajn rilatojn inter la riĉaj landoj, oni estas ĉiam sub la ĝangala leĝo : siaflanke la ŝtatoj devenaj de la malkoloniiĝo ricevas "helpon" multekoste pagitan, tial ke la plejparto devas pliŝuldiĝi por pagi interezojn de siaj ŝuldoj ! La neŝtataj organizaĵoj elĉerpas siajn homajn kaj monajn rimedojn por "ŝtopi iujn truojn, sed ĉiam la malŝparo de iuj najbaras kun la

manko de aliaj : ĉiam la amasa detruo de la troproduktaĵoj de la riĉuloj iras flanke de la malsatego de la ekonomie submetitaj landoj.

La planeda civitano ekde nun devas per sia tuta povo prizorgi la problemon. Laŭ mia opinio tie situas la "kriza punkto" per kiu esprimiĝas la nuntempa tutmonda civitismo.

*

Mi dezirus do provizi pri la temo iujn elementojn de pripenso des pli utilajn, ke oni malofte trovis ilin prezentitaj en la kutimaj ekonomiaj verkoj.

Unue ni devas konstati la ekziston de ampleksegaj senharmoniiĝoj en la enlanda ekonomia situacio de la diversaj landoj en la mondo. La malkoloniado subite ĵetis la elvolviĝantajn landojn el kompleta regateco, el kvazaŭ triba organizado, al la Wall-Street-a financo. Se la registaroj kaj la ŝtatoj bone-malbone sekvis tiun revolucion, la socia organizado de la landoj profunde suferas pro tio. La Afrika socio, ekzemple, estis profunde neegaleca. Ekzemple, en Kamerunio, la kredo al "Ekong"(*) ebligis al kelkaj privilegiitaj familioj pliriĉiĝi malprofite de la subularo, kiu opiniis la situacion normala. Nun dank'al la demokratiiĝo kaj la "laikiĝo" de la civila povo ĉiu rajtas aĉeti aŭ vendi ; la estro, antaŭlonge ĉiopova, devas obei la registaron. Li nun estas nur impostokolektisto(**). Aliflanke, la gravaj decidoj ne plu estas faritaj sub la porparola arbo, tial ke ili venas de supre, t.e. de la registaro. Kaj se en la kamparaj regionoj la respekto al la estro plu estas, oni tamen ne plu trovas spuron en la urboj. Nu, la enurbiĝo kreskis pro duobla kialo : unuflanke pro la logado de la urbo al la kamparano malriĉigita kaj logita de la miraĝo de vivo laŭdire pli facila,

(*) povo simila al tiu de la sorĉisto, provizita per dia povo.

(**) de Rosny. Jam citita verko.

aliflanke pro la volo de registoj, kiuj favoris la translokiĝon de tutaj loĝantaroj por grupigi ilin en urbaj distriktoj. Aldonu al tio la homamasajn migradojn pro la militoj, kiuj ĵetas milojn da familioj sur la vojojn, ekster la batalaj regionoj. El tio naskiĝis tiuj leproj konsistantaj el kvartalaĉoj plenigitaj per senlaboruloj kaj kie instaliĝas la malsano, la malsato kaj krimado !

Tiam okazas la disiĝo de la grupo, kies forto kuŝis sur la kohereco kaj la energioj de la tradicioj, pri kiuj nun restas nur iuj malprecizaj superstiĉoj sen povo strukturanta por la animo.

Paralele, kaj singardeme sub la avidplenaj okuloj de la malriĉigitaj homamasoj, elmetiĝas la maldeca lukso de la povhavantoj : malhonestaj oficistoj, koruptitaj ministroj postsekvas la antaŭajn gravajn feŭdajn estrojn kaj plensatigas siajn inklinojn al luksa vivo malprofite de siaj regatoj. Cetere ankaŭ ili estas facilaj predoj por ĉiuj internaciaj malhonestuloj (individuoj aŭ plurnaciaj entreprenoj), kiuj plenigas siajn poŝojn, kaj tiujn de siaj "klientoj" per la enspezoj subŝtelitaj el la internacia helpo.

Inter tiuj du polusoj situas honestuloj, ofte regantoj de la koncernaj landoj. Saturite de okcidenta kulturo ofte akirita en niaj universitatoj, ili provas favori la "superiĝon" de sia lando, paŭsante ĝian ekonomion sur tiun de la riĉaj landoj kun kiuj konkurenco ofte sukcesas interalie dank'al la malalta kosto de la subpagata manlaboro. Ili plenumas grandegajn klopodojn por provizi siajn landojn per modernaj substrukturoj : kreo de malsanulejoj, grandaj ŝoseaj laboroj, supermezuraj baraĵoj. Ne ĉio sukcesas : estas ofte multe da dirindaĵoj pri la ekologiaj reefikoj de tiuj modernigaj politikoj.(*)

Ankaŭ ne ĉio estas forĵetinda, ĉar en mondo kun senbremsa internacia konkurado, la elvolviĝantaj landoj situas antaŭ la alternativo : antaŭeniri aŭ perei.

(*) Pri tio vd. la mimeografitan kurson de la Instituto por Tutmondismaj Studoj, 1981 : "Novaj Energioj por Solidara Mondo".

Cetere, ankaŭ la nacioj de la t.n. okcidenta mondo - inkluzive de la socialismaj landoj - devas fronti al ekonomiaj kontraŭaĵoj fakte nesupereblaj kaj pri kiuj nur iuj ŝajnrimedoj foje kaŝas la akrecon ! Troa produktado, troa industriigo, progreso de la teknikoj, disvolviĝo de la robotiko kaj de la informadiko pridemandas la aliancon inter homo kaj maŝino. Jam oni ne plu scias, kiu el ambaŭ laboras por ke la alia vivu, jam estas pridiskutata la semajna labordaŭro. Morgaŭ pridemandiĝos la neceseco de la laboro, almenaŭ tia kia miljaraj tradicioj naskitaj de la antaŭmaŝinisma erao enradikigis ĝin en nin.

Ĉar de nun la "rajto je laboro" proklamita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ne plu ĉie povas esti certigata kaj oni monkompensas tiun labormankon ; la uzinoj maldungas ; la ŝtatoj subtenas per subvencioj la senprofitajn industriojn, la bredistojn, kiuj buĉas sian brutaron !

Tute kompreneble, ĉiuj tiuj problemoj ne estas solveblaj sen plena reekzameno de ĉiuj ekonomiaj leĝoj ĝis nun konsentitaj. Tiom longe dum la principo pri tutmonda solidareco ne estos proklamita unuaeca kaj la konsekvencaj solvoj pripensitaj, nenio povos ŝanĝiĝi.

Rilate al tio mi mallonge mencios la laborojn de la tutmondistoj-abundistoj, kiuj reprenis, pliakrigis kaj aktualigis la temojn de Jacques DUBOIN kaj de Charles WARIN pri distribua ekonomio kaj tutmonda monunuo(*). Ilia tezo estas simpla : substrekinte la paradokson, kiu trudas al la laboristo la malpliigon de ĝia konsumado (manke de pagrimedoj) dum la produktokapabloj kreskas dank'al la mekanikiĝo - kaj tio paralizas la ekonomion - la abundistoj deklaras, ke nun tute male : "la priproduktaj pliiĝoj fare de la aŭtomatiko estas tiaj, ke la produktado estu distribuataj proporcie kun la produktokvanto kaj ne kun la laborkvanto ; tio implicas, ke ĉiu civitano

(*) Vd. "Sortir le socialisme de la crise" (elirigi la socialismon el la krizo) de François Mauroche, kaj "Une monnaie pour un nouvel ordre économique mondial" (Monunuo por nova tutmonda ekonomia ordo) de Charles WARIN (Club Humaniste)

enspezu de la naskiĝo ĝis la morto sian parton de la distribuaĵo per sociala salajro". Kompense, ĉiu devos dediĉi tempon de sia vivo al sociala servo. La socio determinos tiujn servotempojn, laŭ la diversaj agadfakoj kaj kalkulante kun la laborkondiĉoj. "Tiel do, post la sklaveco kaj la servuto malaperos la salajrado."

La sama revolucia penso gvidas la proponojn pri la tutmonda mono. Tro longe estus tie elvolvi tezojn, pri kiuj oni trovos tre klarajn prezentojn en la jam cititaj verkoj. Ni notu nur, ke ili sugestas je ĉiuj niveloj la enpraktikigon de la solidarecaj valoroj, kiuj ŝajnas al ni esencaj por la plenumo de ĉia civitismo(*).

Multaj aliaj perspektivoj malfermiĝas en tiu senco por la pripenso de la planeda civitismo. Ni menciu la gravecon de la kooperativa komerco tie kaj tie sporade praktikata, kiu povus plivastiĝi al Nord-Sudaj interŝanĝoj, kiel atestas la freŝdata kreo de Monda Fonduso de Solidareco (**) fare de la "Kongreso de la Popoloj", ĉi-lasta naskita de la Civitanoj de la Mondo.

Ĉiuj tiuj demandoj estas el la plej gravaj, eble decidigaj por la estonteco de la tuta homaro, tial ke per feliĉa solvo povus eble naskiĝi senfina paco per la fino de la nesolvebla antagonismo inter la du "blokoj". Fakte la monda ekonomia disiĝo en du tendencoj, kapitalisma kaj socialisma, povus esti kaduka : la puŝo de la novaj teknologioj, kiu signas la finon de la nuna industria ordo, jam sin apogas sur novaj sociaj valoroj.

James Albus, Direktoro de la Instituto pri Robotiko en Darbor (Michigan), humure rimarkas, ke la homaro neniam ĉesis ekde la romia erao koni la sklavecon ; hodiaŭ ni estas la sklavoj de la salajro. Tamen "neniam la romianoj sukcesis, ke la sklavoj surstrate manifestacias,

(*) Vd. interalie la mimeografitan kurson de Charles WARIN : "Tutmonda problemo de la krudaj materialoj", 1978-sesio, Instituto por Tutmondismaj Studoj, same kiel tiujn de la 1988-sesio pri la tutmonda Ekonomio.

(**) 15 rue Victor Duruy, F 75015 PARIS.

postulante la garantion de la sklava kondiĉo."

"Nu, aldonas la aŭtoro, en la socioj, kie la enspezo dependas de la laboro, la ekonomio fariĝas la esenca determinismo de la homa destino. La ideologiaj sistemoj kontraŭstariĝas rilate al la rimedoj rearanĝi la sklavigadon de la salajro. Ĉu la socialismo aranĝas la sklavecon pli bone ol la liberalismo ?"

Memkomprene, tie ne konvenas partianiĝi, sed ja en la kurso pri civitisma edukado, la problemeroj estos proponataj al la planeda civitano.

## ĈAPITRO IV

## LA DEMOGRAFIA EKSPLODO

Tiu demando estas ligita al la antaŭaj. Problemo por nia epoko, ĝi mem solviĝos, se la tutmonda ekonomia ordo stariĝos sub la signo de la solidareco, pri kiu mi diris, ke ĝi estas la precipa valoro de starigita planeda civitismo.

Laŭ ideo disvastiĝinta dum tiuj lastaj jaroj, la eksponenta kresko de la globloĝantoj gravedas je minacoj : dum la estonta jarcento, la tero ne plu kapablos nutri siajn dek miliardojn da loĝantoj. Ankaŭ la nuna situacio estas pli ol angora.

Milionoj da viroj, da virinoj, da infanoj mortas pro malsato ĝuste en la landoj, kie la demografia kresko estas la plej alta : Latina Ameriko, Nigra Afriko, Hindio. Kaj la decidoj fare de la internaciaj organizaĵoj aŭ de la lokaj registaroj ne sukcesas bremsi la plagon. Nu, inter tiuj aranĝoj, la plej vaste konsentita kaj kiu devenas de simpla matematika rezonado, estas la naskolimigo.

Sugestita aŭ devigita ĝia principo estas ne egale konsentita - kaj la apliko ofte katastrofa, fare de la koncernaj loĝantaroj. Do, malsukceso.

Konsekvence necesas denove bone pensi pri la problemo. Cetere tion ekfaras la responsuloj de la internacia politiko kaj plaĉas al ni konstati, ke tiuj novaj direktoj tute iras al la tutmondistaj analizoj. Jen ili resumitaj :

1. El la komparo de la situacio de la riĉaj landoj kaj de malriĉaj landoj (kaj kompare kun tiu de la plej senhavaj loĝantaroj en la unuaj : la kvara mondo) oni povas konkludi, ke la plialtiĝo de la naskiĝkvanto proporcias kun mizero.

2. Neniu programo pri nasklimigo daŭre sukcesos en regionoj, kie la analfabeteco superregas. Tie la buŝaj tradicioj havas grandegan forton kaj aliaj vivmanieroj ne daŭre influas.

La konkludoj eltirendaj el tiuj konstatoj instigis jam senteblan ŝanĝiĝon de la UNO-filiaj labordirektoj. Oni ekkomprenas, ke okazis gravaj eraroj. Cetere, pli ol unu leganto eble miros, eksciante, ke UNESKO sin montras pioniro en tiuj kampoj, kerno kun tutmondista spirito en oceano de internaciista ĝangalo. Substrekinda fakto, ne nur pro si mem, sed pro estonteco : UNESKO estas morala potenco, sur kiu facile oni sin apogos, kiam parta transdono de suvereneco de la ŝtatoj ebligos la kreadon de tiuj supernaciaj institucioj, kies neceson ni senĉese deklaras.

Tamen estas punkto, pri kiu la publiko, pli aparte en Francio, ne sufiĉe atentis. Tio estas tiu fama prinaskiĝa politiko (*). Temas, laŭ niaj regnestroj, "antaŭgardi la ŝancojn de Francio, ebligi al ĝi konservi sian rangon sine de la nacioj" ktp... Kiu ne sentus la mucidan naciismon (kaj eĉ nekonscian rasismon) esprimitan de tiu sinteno? La tutmondista filozofio ne povus konsenti ĝin kaj cetere en la tutmonda federaciisma politika organizado, ĝi ne plu

(*) Dum la sama tempo, la indekso pri demografia kresko malaltiĝus en la riĉaj landoj, kiuj ne plu estas certaj pri konstanta anstataŭiĝo de la loĝantaro je la horizonto de jaro 2000. Tial naskigema politiko tendencas sin starigi (kromsalajro, familiaj monsubtenoj). Tial ke samtempe la kvanto da senlaboruloj ne ĉesas kreski, oni multobligas la monsubtenojn al la senlaboruloj. Komprenu kiu povos !

estos pravigebla. Ni estu klaraj : kiam ĉiuj nacioj estos egalecaj antaŭ racia planeda ekonomia organizado, ne plu necesos tiu senbremsa konkurado, kiu nun estras.

Kiam realiĝos la "libera moviĝo" de la homoj (jam enskribita en la Universala Deklaracio kaj en la Traktato de Romo), ne plu necesos instigi la francianojn naski infanojn por certigi la vivtenon de siaj kriplaj gepatroj aŭ geavoj, tial ke pli multnaskaj landoj provizos sufiĉe da ili.

- Nu ? Vi minacas nin per invado de kolorhaŭtuloj aŭ de Araboj... (interkrampe : la araboj estas blankhaŭtuloj...)

- Kaj eĉ se tio estus! Jam ĉiuj ni estas la rezultato de etnaj (kaj ne rasaj : estas nur unu homa raso) kaj kulturaj miksadoj. La akcelo de la modernaj tempoj nur rapidigos la transformiĝojn. Koncerne la malaperon de la okcidenta civilizacio, ni ne multe timas post mezlonga tempo : la nuna tendenco estas ĝia superregado.

Sed eĉ se konsente pri tiu ekstrema okazo, kio tio estus kompare kun la teruraj mizeroj, kiujn ĝi sukcesis enstarigi en la nuna mondo : malsategoj, militoj, minaco de kompleta detruo de la homaro ?...

Jen kion povus diri de nun ĉiuj disdonantoj de tiu tutmonda civitisma edukado, tiel necesa.

## KONKLUDO

Kiam ni ekrigardas al nia infanaĝo, ni povas nur miri pro la multeco de ŝanĝiĝoj okazintaj dum malpli ol unu jarcento. Multaj el ni konis la petrollampon, la karbfornon, la ĉevalveturilojn.

Ĉu la transformiĝoj, kiujn la nuna junularo travivos, estos pli radikalaj ? Ĉiel la juĝokapabloj de la estontaj generacioj estos pli kaj pli petataj en pli kaj pli multaj kaj vastaj kampoj komplikitaj per sia planeda interdependeco. Por juĝi pri tio, necesos rigora valorskalo, kies netuŝebla bazo estos la respekto al homo kaj al kio efikas sur la homa ekzisto.

Ĝis nia epoko, kaj ne sen blindaj palpoj kaj eraroj, la homa specio laboris por havigi al si plej bonan ekvilibron inter si kaj si mem, si kaj sia ĉirkaŭaĵo. Tiu ekvilibro estas ankoraŭ tre rompiĝema kaj minacata. Same kiel grandaj animalaj specioj malaperis pro kataklismoj, pri kiuj ni havas nur malgrandan ideon, la homa specio, malgraŭ sia inteligento, kaj eble pro ĝi, eble malaperos en kataklismo de ĝi estigita.

Kiel eksorĉisto la homo ludas per la fajro de la scio. Tiel, ke la scienculo foje retroiras, timigita, fronte al la demonoj, kiujn li malkovras en sia kaldrono. La nunaj kapabloj de la genetiko, inter aliaj, pretiĝas malordigi la kampon de nia miljara moralo. Ĉi tiu haltis je la limoj de la videbla mondo, kaj lasis al la "dioj" la zorgon tranĉi tion, kion la homo ne sciis aŭ ne divenis. Nun la homo povas sin kredi Dio, tial ke li povas fabriki la vivon. Kiel li elektos ? Ĉu baldaŭ ni povos testamenti nian genetikan heredaĵon same kiel niajn materialajn posedaĵojn ? Ĉu ni

povos laŭvole fabriki subhomojn aŭ superhomojn per la manipulo de la genoj (ĉar oni baldaŭ povos malaperigi malsanojn per tiu rimedo) ?

Verkistoj kiel Aldous Huxley aŭ Orwell en viziaj fikciverkoj elvokis la danĝerojn de tiuj eblecoj (nun ili estas multe tro realaj pro la grado de morala maturiĝo atingita de la homaro).

Ĉu la realaĵo baldaŭ superos la fikcion ? La sorĉolernanto ja ludas per la fajro, sed male de la animalaj specioj malaperintaj pro kataklismoj, pri kiuj ili nenion komprenis kaj kies fluon ili ne povis modifi - la homo povas imagi tion, kio atendas ĝin. Provizite per intelekto, sed ankaŭ per racio, per malbonaj emoj, sed ankaŭ per la sento de la bono, ĝi povas plenumi sian liberan taksadon, ĝi ankoraŭ povas elekti sian sorton.

Ni esperas, ke ĝi sane elektos tiun sorton, kiam ĝi estos plene informita pri la problemeroj ; pri la transdono de tiu informado rolos la civitisma edukado kaj ne estos malgajiga la tasko kontribui al tiu sukceso fare de la edukistoj. Ĉiu edukanto estas pigmalio kaj Pigmalio estas feliĉa antaŭ la sukcesa verko. Kaj kiu verko pli bela, ol ebligi la elvolviĝon de junuloj al la propra plejbono ?

Des pli, ke tio ne estos tiom malfacila. La aspiro al la sindono, la herookulto, kiu kuŝas funde de ĉiu naiva koro, povos floradi en la solidareco pli bone ol en la militemaj virtoj. Se estas vere, ke la junularo bezonas sin identigi al heroaj modeloj, ĉu ne estas pli bone admiri ne iujn Bonaparton aŭ Cezaron, sed prefere Pierre Curie, Gandhi kaj Luther King ?

La civitisma edukado, absoluta neceso de nia tempo, ankoraŭ ĝuos belan estontecon.

***

# ALDONAĴOJ

La leganto, kiu dezirus favori iun mondcivitanan edukadon, eble sin trovos senhava, maltrankvila pro la nuna malpleno en tiu kampo, kaj demandos sin kiel procedi por fari tion. La sekvantaj paĝoj celas doni al ĝi iujn informojn pri la proponataj eblecoj, kiujn ĝia aktiva kunlaborado povos nur pliampleksigi.

1. Unue ni diru, ke oni povas influi sur la oficiale ekzistantaj programoj pri civitisma edukado. La tutmondistaj instruistoj kaj edukantoj povas efiki al la ministraj decidoj en tiuj kampoj, CREPEM (Esplorcentro por tutmondisma edukado)(*) kun sia "Komisiono pri Programoj" faris kaj ankoraŭ faros proponojn per la eldono de novaj studoj, pri kiuj ni donos specimenaron ĉi-poste.

2. Poste ni memorigu, ke tujajn agadojn povas entrepreni la instruistoj en la kadro fiksita al ili per la tekstoj. Tiel estas pri utiligo de tiaj laboroj kiaj "Programo por Eduka Agado".

Ni donos poste, kiel ekzemplon, slipon pri konsiloj proponataj al instruistoj por aplikado de ilia ĉarto.

(*) 217 avenue des Acacias, F-83140 SIX FOURS

Dokumento 1

# SUGESTOJ POR UTILIGO DE LA ĈARTO DE LA TUTMONDISTAJ INSTRUISTOJ KAJ EDUKANTOJ (*)

Tiu ĉarto ne estu konsiderata kiel memfino aŭ abstrakta kaj malproksima idealo, sed kiel gvidilo kaj laborilo por ĉiuj, kiuj sin ŝarĝas per la formado de la nuntempa junularo. Multaj edukantoj, konvinkitaj pri la ĝusteco de tiuj proponoj, demandas sin kiel fakte utiligi ilin. Plejparte ili sentas sin katenitaj en truditaj programoj, kiuj lasas al ĝi neniun lokon, aŭ defiitaj per manlibroj, kies inspiron ili denuncas. Iu nombro eĉ neniam referas al tiuj manlibroj, kiuj dormas neutiligitaj en la bibliotekoj dum monatoj. Tio estas eraro laŭ nia opinio, ĉar ties kritika uzado povus sin montri multe instrua.

Ni ŝatus, ke ĉiuj trovu ĉi-poste sugestojn, kiuj, malfermante iujn perspektivojn, eble ekzaltos ilian imagkapablon.

1. Interese estus traserĉi en la libroj, pri kiuj disponas la junularo (manlibroj sed ankaŭ distraj libroj), la "stereotipojn", kiuj atestas pri rasa aŭ kultura ŝovinismo pri filozofia aŭ politika netoleremo (kiam la infanoj estas ĵetitaj sur spurvojon, ĝenerale ili multe ŝatas tiajn enketojn).

2. Farigi komparajn studojn pri historiaj periodoj por el tiuj malkovri la "konstantaĵojn" en la rilatoj inter popo-

(*) Vd. la tekston de tiu ĉarto sur p.3.

loj, inter popoloj kaj registaroj, tra la naciistaj falsadoj de la historiaj faktoj (la studo pri la militoj tie estus aparte fruktodona).

3. Fari komparajn studojn de naciaj konstitucioj laŭ tempo kaj laŭ spaco ; montri, ke la evoluo de la leĝaroj sekvas la moran evoluon ; konsciigi pri la homa diverseco, pri ĝiaj moroj kaj tradicioj ktp...

4. Farigi mediajn enketojn malkovrantajn la opinion de la individuoj, en iuj determinitaj loko kaj momento, pri la problemoj, kiujn mencias la Ĉarto.

5. Utiligi la projekciadon de filmoj aŭ de TV- aŭ radioelsendoj por naskigi diskutojn pri tiuj diversaj temoj.

6. Instigi la junulojn ekrilati kun la landaj minoritatoj (enmigrintoj, rifuĝintoj ktp) por ke ili praktike ekkonu iliajn malfacilaĵojn.

7. Kuraĝigi ilin aktive partopreni en kampanjoj aŭ manifestacioj favore al la homaj rajtoj, kontraŭ malsato, rasismo, por la defendo de la naturo, por la paco. Konigi al ili la grupojn de neperforta agado.

8. Konsistigi klubojn de tutmondistaj junuloj, krei intergrupajn gazetojn, favori la renkontiĝojn kun aliaj similaj grupoj apartenantaj al aliaj naciecoj ; tutmondanigi tiujn klubojn aŭ lernejojn kaj ĝemeligi la tiel tutmondaniĝintajn grupojn.

Dokumento 2.

## PROPONOJ POR ĈARTO

## PRI TUTMONDA CIVITISMO (*)

*Ĉia civitismo konsistas en la konsciiĝo fare de la individuoj pri ties solidareco kun la komunumo, al kiu ili apartenas, kaj pri la responsoj implicitaj je la agada nivelo. La tutmonda civitismo situas je la planeda nivelo, kie ĝi montriĝas nepre necesa al la florado de la homa specio.*

### ANTAŬPAROLO

Inter la gravaj specioj, kiuj sinsekve loĝatigis la teron, la homo okupas privilegian situacion. Provizita per la parolo, kapabla je antaŭvidoj kaj projektoj, la homo, ujo de diversaj konfliktoj, kapablas je plejbono kaj malplejbono. La malrapida specia evoluo ne okazas sen baraktoj. Nia epoko ŝajnas signi turniĝon en ĝia sorto. Unuafoje dank'al la progreso de la teknikoj kaj al la graveco de la sciencaj eltrovoj, animala specio kapablas estigi sian propran detruon, sed, samtempe, la tuta homaro povas konsciiĝi pri sia unueco.

Grandaj fortoj estas en ĝiaj manoj. Ĝi ne plu povas obei sen pripenso. Per pli bona kono, homo ĉiutage akiras pliigitan potencon super la materio. Li devas pli ol iam mastri sian spiriton. Mondskale civitismo stariĝu ; kompletigante la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, iu ĉarto de la devoj de la mondcivitano lumigu la individuon pri ĝiaj devoj rilate al la tuta homaro.

(*) ellaborita dum la tutmondistaj tagoj en CAEN (1976).

## ARTIKOLO 1. LA TUTMONDA NATURA HEREDA POSEDAĴO : KOMUNA POSEDAĴO

Homo devas defendi tiun heredaĵon kontraŭ la agresoj de kiu ajn deveno, ĉar la pluvivo de la terglobo dependas de tio : la biosfero, la akvo, la flaŭro, la faŭno devas esti protektataj laŭ la propra ekologia ekvilibro ; la naturaj riĉofontoj de la grundo, de la subgrundo, de la maroj aŭ de la lagoj ne povus aparteni propre al unu homgrupo, kiun hazardo kondukis instaliĝi en ia-tia globloko, prefere ol al aliaj malpli bonŝancaj. Tiuj riĉofontoj estu rigardataj kiel komuna posedaĵo de la tuta homaro kaj mastrataj per tutmondaj organismoj, kiuj certigos ilian sanan ekspluatadon kaj la redisdonadon de la eltirebla profito.

## ARTIKOLO 2. LA REGADO DE LA TEKNIKA PROGRESO. LA SCIENCA RESPONDO.

Ĉiuj sciencaj eltrovoj, ĉiuj elpensoj povas naski damaĝajn konsekvencojn por la homo. Konstanta "moralo" pri defendo de la homaj interesoj devas superregi la aplikon de ĉiu eltrovo. La responso pri la eblaj konsekvencoj de tiuj eltrovoj trudiĝas al la tuta socio. La serĉisto, same kiel ĉiu civitano, partoprenas en tiu responso.

## ARTIKOLO 3. LA RESPEKTO DE LA FIZIKA TUTECO KAJ DE LA HOMA DIGNO

I. La homo rajtas je la plej bona ekvilibrostato, kiun oni nomas sano. Tiu propono naskas plurajn konsekvencojn :

a) la reciproka solidareco de la homoj. Nenie sur la globo oni povos konsenti, ke la malsatego aŭ la malsano aŭ la naturaj katastrofoj trafos homgrupon sen tuja mobilizo de ĉiuj energioj por kontraŭbatali tiujn plagojn.

b) La planedaj riĉofontoj estu dispartigitaj tiel, ke malaperu la malegalaĵoj, kiuj senigas iujn homojn je la necesaĵoj.

c) La malŝparo de la naturaj riĉofontoj aŭ de la teknikoproduktoj estu taksata krimo kontraŭ la tuta homaro.

d) Ĉar la sanstato povas dependi de la socia medio, oni devas atente prizorgi tiel la preventon de la malsanoj kiel la kuracan medicinon. Higieno kaj sociala medicino estos absolutaj prioritatoj. Tutmondaj organismoj prizorgos tion.

La rajto je laboro nun skribita en niaj konstitucioj neniel devos naski la homan ekspluatadon fare de homo. Ĝi devas ligiĝi kun la rajto je libertempo kaj ripozo.

II. Ĉiu individuo kaj ĉiu homgrupo estas respektinda pri siaj kredoj, siaj tradicioj, sia kulturo, se ĝi ne priarogas tion por subpremi siajn samsortanojn, kaj se ili ne kontraŭas la principojn ĉi tie priskribitajn.

III. La plenumo de la justico ne povas esti fondita sur ideo de venĝo fare de socio kontraŭ kulpinto. La ekzisto de krimuloj estas konsiderenda kiel bankroto de niaj institucioj : pli utilas por la tuta homaro malaperigi la kondiĉojn de la deliktado (fizikan aŭ moralan mizeron) ol pligrandigi la malliberejojn.

## ARTIKOLO 4. LA HOMA UNUECO

Fundamenta unueco ekzistas inter ĉiuj homoj kiaj ajn estas onia sekso aŭ raso.

La milito kaj la torturo estas krimoj kontraŭ la tuta homaro (fabrikado kaj vendado de armiloj estas metendaj samnivelen kiel ties uzadon).

Nur per la havigo al si de tutmonda morala konscienco la homa specio povos ekabomeni ilin. Ĉiu homo devas partopreni en ilia elradikigo. La konscienc-obĵetado, la neperfortaj luktoj povas esti kontraŭstarigitaj al ili.

## KONKLUDO

La ekzisto de tutmonda morala konscienco ne estas memsufiĉa. Tutmondaj institucioj, ricevintaj de ĉiu ŝtato aŭ komunumo limigitan sed realan transdonon de suvereneco, devos prizorgi la konsistigon kaj la aplikadon de leĝoj kaj reguloj pripensitaj por la pluvivo de la homa specio.

Dokumento 3.

## MANLIBRO PRI CIVITISMA EDUKADO

je la uzo de adoleskantoj aŭ de lernantoj en konstanta formado : tekstoj, dokumentoj, gvidiloj por la traserĉo.

Analizo de la ĉapitroj :

Enkonduko : la homa estaĵo responsa pri la tuthomara komuna hereda posedaĵo.
Unua parto : respekto al la natura medio ; respekto de la homo (la liberoj - kredaro kaj opinioj ; sklaveco), la etnaj minoritatoj - la migrantoj ; la virinoj ; la infanoj ; la rasismo.
Dua parto : la fizika tuteco, la sano : praktikistoj kaj medicinaj praktikoj ; la medicinaj kostoj ; la "naturaj" medicinoj ; toksoj kaj toksomanio ; sporto kaj fizika kulturo.
Tria parto : la individuo en la socio (rolo de la familio); la justico kaj sankcioj (malliberejo, mortpuno).
Kvara parto : devoj de la planeda civitano ; regado de la scienca kaj teknika progreso. Humanigo de la loĝkondiĉoj. La fenomeno "aŭtomobilo". Respekto de la kulturoj kaj de la civilizacioj. Defendo kaj organizado de la paco; solidareco.
Cele al supernaciaj institucioj (la interŝtataj organizoj kaj ties mankoj).

Dokumento 4

## UNU EKZEMPLO : LA SOLIDARECO

Ĝi estas unu el la devigaj fundamentoj de la socia vivo, ĉar la vivteno kaj la florado de ĉiu individuo dependas de la pluaj egalecaj rilatoj kun aliuloj.

Kiam iuj forgesas tiun necesaĵon, okazas streĉoj, kiuj atencas kontraŭ la kunteniĝo mem de la grupo. Cetere, la bezono pri justeco enradikiĝinta ĉe la koro de la homaj estaĵoj igis la solidarecon morala valoro universale agnoskita. Tiu nocio ne estas freŝdata(*) sed longtempe estis forpuŝita pri la laŭdego de la bonkoreco. Nu, ĉi-lasta naskas malekvilibron en la homaj rilatoj : la helpito ekonomie kaj sentimentale dependas de la bonfarinto, kiu arogas al si rajton je dankemo. Tiu rilato ne limiĝis je la interŝanĝoj de individuo al individuo. La riĉaj landoj pravigis sian plenan estradon super la landoj konkeritaj nome de la "materia kaj spirita civilizacio", kiun ili kunportis. Modifi la naturon de la interŝanĝoj inter ĉi-lastaj kaj la koloniinto ne estis la plej malgranda konsekvenco de la malkoloniado.

### KIEL ESPRIMIĜAS LA SOLIDARECO ?

Ĉie la prisolidareca teksaĵo estas tiel kompleksa, ke ni ne ĉiam kapablas raporti pri ĝia realeco. Simple notu, ke la leĝoj, kiuj fiksas la impostojn aŭ la socicelajn deprenojn, pravas nur per la nacia solidareco. Plie al tiu institucia solidareco aldoniĝas la memvola kontribuo de civitanoj al privataj organizaĵoj(1).

(*) Atestas pri tio malnovaj tekstoj, tiaj la fabelo de Ezopo (reprenita de La Fontaine) : "La membroj kaj la stomako". Vidu ankaŭ la poemon de Sully Prudhomme : "La plugisto sonĝe diris al mi"...

(1) La Ne-Registaraj Organizaĵoj, tre multnombraj, tiel iniciatas ripari la ŝtatajn mankojn por helpi la bezonantojn.

Sur la internacia nivelo, la lastaj jardekoj vidis aperi kaj kreski la malekvilibron inter riĉaj landoj kaj landoj naskiĝintaj de la malkoloniado. La situacio de tutaj loĝantaroj hodiaŭ estas senespera : malsanoj, malsategoj premegas ilin dum la registaroj ne trovas la rimedojn sin ŝarĝi per ili. La solidareco inter nacioj, kvankam reala, ne sufiĉas por tio (2). Tiam intervenas ĉiaj privataj iniciatoj, kaj iuj opinias, ke ilia agado estas nepre necesa por kompletigi - kaj ofte anstataŭi - la nesufiĉan helpon de la ŝtatoj.

POR LA ESPLORO

1. Determinu la globregionojn, kie tute aparte sentiĝas la malriĉeco. Prezentu ilin sub formo de mapoj, kiuj precizigas :
   - la triamondajn subelvolvitajn regionojn
   - la lokojn de malsategoj naskitaj de naturaj kaŭzoj (kiaj ?)
   - la alfluon de translokitaj loĝantaroj pro militoj (kiaj ?)
2. Studu la kazon de iuj urbegoj naskantaj mizeron.
3. Kia estas la specifeco (principoj kaj maniero de funkciado) de jenaj organismoj :
   - Internacia Ruĝa Kruco
   - UNRWA : Helpo al la militrifuĝintoj (organismo de UNO)
   - Internacia Urĝa Agado
   - C.M.S. : Monda Helpo-Taĉmento
   - Mondkuracistoj
   - Senlandlimaj kuracistoj
   - Monda Organizaĵo de la Sano (O.M.S. aŭ W.H.O.) ?
4. Ĉu vi konas aliajn ? Precizigu.

--------

(2) Tamen la filioj de UNO kaj la Eŭropo-Komunumo maksimume prizorgas tion. (Vd. ĉapitron pri la internaciaj institucioj).

## NETAŬGA HELPO

La riĉlandaj registaroj kaj la interŝtataj organizaĵoj elmontras grandan volon kontribui al la progreso de la evolulandoj. Sed pro la pezaj kaj burokrataj strukturoj tro ofte la helpo ne aŭ malmulte atingas siajn adresatojn. La Ne-Registaraj Organizaĵoj sukcesas ofte pli bone.

*Ĉu vi opinias, ke la helpo de la Ne-Registaraj Organizaĵoj havas avantaĝojn super la oficiala helpo?*

*– Jes, mi vidas, ke la oficiala helpo estas ofte tre granda, grandskala. Ĝi estas grandega, prestiĝa, proponas multajn rimedojn kaj estas aranĝita laŭ niaj manieroj, laŭ niaj teknologioj. Mi opinias, ke tio ne estas efika en iuj sudaj landoj, precipe en Afriko. Laŭ la statistikoj 90 % de la kamparana laboro estas manfarita. Se vi importos traktorojn, vi havigos al vi rezultatojn aliajn ol tiujn deziritajn. Plurfoje mi iris en Afrikon kaj mi konstatis, ke relative multe da traktoroj estas forlasitaj, rustiĝantaj en eksmaŝinloko. Nian miregindan helpon oni ĵetas en la rubejojn, aŭ ĝi neniel utilas. Mi ne diras, ke tia estas la tuta oficiala helpo, sed malofte oni sukcesas.*

*(...) Laŭ vi, pro kio la traktoroj donacitaj de N.R.O. estas utiligitaj ?*

*La N.R.O. malofte uzas traktorojn. La N.R.O. prenas, ekzemple, malgrandajn rimedojn anstataŭ konstrui grandan imponan multege kostan baraĵon, kiun oni ne povas prizorgi, kaj kies elektron oni ne povas transporti nek akvon enkanaligi. Kial ne multajn malgrandajn generatorojn, kies mekanismon povas kompreni homoj formitaj en taŭgaj teknikaj lernejoj ? Anstataŭ uzi la altnivelan teknologian en la konstruo de baraĵoj, kial ne preni la simplan teknologion ? Por la konstruado de domoj, kial importi, ekzemple, ondumitajn ferladojn ? Laŭ mi, tio estas tage tre varma*

*kaj nokte tre malvarma, kaj plie tio rustiĝas. Ofte tio estas importita el Eŭropo, kiom koste la transporto postulas ! Kial ne serĉi alian konstrumaterialon por la tegmentoj kaj la muroj, materialon surloke troveblan : brikoj aŭ blokoj, aŭ provi kunmeti pajlon kun argilo? En tiu perspektivo necesas serĉi kaj mi opinias, ke la Ne-Registaraj Organizaĵoj estas kapablaj fari tion, kaj tio estas multe pli firma, utila laboro, kiun ili povas liveri.*

*(...) La vera disvolviĝo pasas per la manoj, per la spiritoj de surlokaj homoj, per iliaj rimedoj, ilia genio, adaptitaj al ili, kaj ne per freneza teknologio, kia estas la nia.*

*J. ULBURGHS en "Le Courrier A.C.P."*

## LA V OLONTULOJ POR LA PROGRESO

*Resume, la "utila aventuro"... De antaŭ pli ol 20 jaroj, pluraj miloj da geeŭropanoj deziris kaj travivis ĝin. Kuracistoj, flegistinoj, agrokulturaj teknikistoj aŭ inĝenieroj, fakuloj pri konstruo aŭ hidraŭliko, metiistoj. Oni renkontas ilin ĉe la putoj aŭ malgrandaj baraĵoj, sur la legomkulturejoj, partoprenantaj en la organizo de kamparanaj grupiĝoj, aŭ de kooperativoj, en la animado de projektoj pri kamparana sano, aŭ ankaŭ asociitaj en sociaj agadoj ĉe la urbaj randoj. Oni nomas ilin "progresvolontuloj", por distingi ilin disde la "urĝovolontuloj" - tiuj, kiuj intervenas en la katastroflokoj aŭ en la militkampoj.*

*Nun, nur koncerne Eŭropon, proksimume 8500 laboras en la tria mondo : 1377 germanaj volontuloj, 984 belgaj, 343 danaj, 1522 francaj, 1321 britaj, 762 irlandaj, 985 italaj, 1220 nederlandaj...*

*Surloke dum restadoj averaĝe inter du- kaj trijaraj ili praktikas kun siaj kunuloj de la evolulandoj "malsimilan kunlaboradon". Eĉ se la profesia kvalifiko*

*kaj la kompetento postulataj de ili estas pli kaj pli altgradaj, la volontuloj ne estas propre "istoj", kiel povas esti la kunlaborantoj kaj fakuloj profesiaj. Oni sin devontigas en la volontadon por iu periodo de vivo. Oni ne faras karieron en ĝi.*

*Fronte al la interŝtata aŭ duflanka kunlaborado, oni devas interalie diri, la volontado ludas novigan rolon pri disvolviĝo-klopodo : kapablo de kontakto kaj de eniro en la medio ; zorgo kontentigi bezonojn kaj respondi petojn esprimatajn de koncernatoj ; kapablo de la volontulo, kiel ne-spertulo, por sin demandi rilate al la problemoj de disvolviĝado.*
*J.D.BOUCHARD en "Le Courrier A.C.P." ibid.*

## LA BATALO KONTRAŬ LA MALSATO

### GRANDAJ BONKORECAJ IMPETOJ...

*Fine de 1984 la telespektantoj de la okcidenta mondo, bone nutritaj kaj komforte instalitaj en sia brakseĝo, estis tiritaj el sia kutima kontentiĝo per la neeltenebla spektaklo de la kruelega sufero de miloj da Etiopaj malsatantoj, filmitaj de brita televidoskipo.*

*Instigite pro tiuj obsedaj bildoj, la publika opinio ekpremis super la registaroj kaj la internaciaj organismoj. Siaflanke la N.R.O. estis superŝutitaj per demandoj kaj proponoj pri helpo. Ununura organizaĵo ricevis, en dumonata daŭro, 2630 leterojn. La mesaĝo entenita ĝenerale estis simpla : Jen mia ĉeko. Faru kion vi povos. La stratulo, la lernejanoj, la emeritoj fine sukcesis alvoki la registarojn kaj la oficialajn organismojn por instigi ilin agi. La unuaj helpaĵoj povis esti alportitaj al la malsatantoj dank'al la klopodoj de la N.R.O-j kaj al la spektaklaj monkolektaj kampanjoj animitaj de Pop-elstaruloj, kiel Bob Geldof. Kia ajn estis la situacio en Afriko, almenaŭ ĝi ebligis al iuj pozitivaj aspektoj*

*sin manifesti. Ĝi aperigis la kompatemon bloke travivitan de la publiko kaj ties volon helpi.*

*IBID.*

... KIUJ FOJE MALTRAFAS SIAN CELON

*En Nederlando, nacia kampanjo kontraŭ la malsato en Afriko ebligis kolekti, en unu tago, pli ol 80 milionojn da guldenoj (34 milionojn da EKU-oj). En Usono, iu N.R.O. spontane ricevis, eĉ ne organizinte plej etan kampanjon, pli ol 20 milionojn da dolaroj, en trimonata daŭro, de septembro ĝis decembro 1984.*

*Tiu subita pluvo de mono por situacio de aparta krizo nepre naskas fone malfacilaĵojn. Ĝenerale la monsumoj estas destinitaj de la N.R.O. al fiksita urĝa situacio. Kiam kreskanta nombro da organizaĵoj, en pli kaj pli multaj landoj, mobiliziĝas profite al preciza situacio, dank'al la modernaj komunikiloj, povas okazi, ke iuj el ili ricevas grandajn monsumojn, kiujn morale ili ne povas utiligi al aliaj celoj, kvankam la bezonoj estas plenigitaj en la konsiderataj landoj.*

*La situacioj ankaŭ povas rapide evolui, kaj problemoj povas okazi tie, kie pro sufiĉaj pluvoj, la rikoltoj povas fariĝi abundaj dum plu alfluas la nutraĵa helpo ; kaj tio povas kaŭzi la ruiniĝon de la lokaj merkatoj, kiel tio fakte okazis en iuj partoj de Afriko en 1986.*

*IBID.*

Tiuj maltaŭgaj kaj elrevigaj spertoj almenaŭ ebligis naski la pripenson. Oni trovas ties eĥon en la perioda gazeto "Actuel Développement" (Aktualaĵo de la disvolviĝo).

LA LECIONOJ DE LA SPERTO

*Kiom da baraĵoj, da irigaciitaj grundoj, kaj eĉ da sun-pumpiloj, konceptitaj laŭ eksteraj modeloj, aper-*

*igis, sed tro malfrue, la gravecon de la homaj faktoroj ! La aktiva partopreno de homoj, ilia sento pri ilia peno en la propra vivmaniero, konsistigas - nun oni scias tion - la unuajn, esencajn kaj ĉefajn kondiĉojn de sukceso.*

*Kiel gvidantoj de agrokultura instruado aŭ agrokulturistoj, ni ne estas transdonontaj praktikojn aŭ teknikojn al afrikaj kamparanoj. Tute ne, sed male, vidi kaj taksi por, revene, instrui kiel lerni la partoprenon en la disvolviĝo de tiuj landoj. Tia estas nia celo.*

*Ni foriras por renkonti afrikajn kamparanojn kaj tio sekvante kiel kondukilon, laŭ la klopodo, du kulturaĵojn : maniokon kaj arakidon. Kial tiuj du kulturaĵoj ? Manioko, tial ke ĝi konsistigas la plej praktikatan pornutran kulturon, kaj ke ni retrovos tiun tuberon en la ĉiutaga menuo de afrikano ; arakido, tial ke ĝi estas jen pornutra kulturo pri proteinoj, jen poreksporta kulturo.*

## KAMPARANA STRUKTURO EKZISTANTA

*En Nigerio ni renkontis la lokajn organizaĵojn kapablajn certigi kaj diskonigi la celaron de tia projekto. La agrokulturistaj kooperativoj kaj la porjunulaj organizaĵoj - aŭ "Samaria" - konsistigas la kolonojn de disvolviĝo, kiu celas la prinutran memsufiĉon. Post konsiliĝo kun la administra aŭtoritato, kun la ministro pri Kampara Disvolviĝo, kun la ministro pri Internaj Aferoj, kaj kun la lokestro, la decido apartenas al la koncernatoj. Eĉ se, foje, ni devas bedaŭri la ĉeeston iom tro pezan de la lokaj intelektuloj, malprofite al la kamparano.*

## HELPI ESTAS ANKAŬ INSTRUI

*De 12 jaroj restadante en Makalandi, Pierre laboras ĉefe en la centro por la agrokultura formado, kiun li kreis tuj post sia alveno kaj kie li instruas en la loka lingvo : la "gurmanĉe". La priformada ciklo*

*estas dujara. Pierre estas helpata de du gvidantoj, kiujn li mem formis. Kune, ili klopodis por ke la precipa loko por laboro kaj apliko de la teorioj estu la ĝardeno. Vera simbolo. Kompleta revolucio en lando, kie tiu nocio de ĝardeno estis antaŭe nekonata. La Niĝera kamparano konas milion kaj sorgon. Ĝi povas labori tie dum tutaj tagoj, fleksita por senherbigi. La bariloj, ĝi ne scias kio tio estas ; la irigacio, ĝi ne multe imagis tion. La laboro de Pierre en unua tempo precipe estis akceptigi iujn el tiuj bazaj nocioj : protekti, akvumi, tajli fruktarbojn, krei bredbedon ktp. Resume krei ĝardenon. Ĝardeno povas ebligi al familioj unue utiligi la propran laborkapablon, poste diversigi sian nutradon. Kaj kial ne : trovi tie fonton de pliaj monenspezoj.*

## LA RADIKOJ DE LA MALSATO

*Unue, en analizo, necesas ĝuste loki la aferojn. Ja la okazaj klimataj katastrofoj - sekeco en Sahelo aŭ superakvoj en Bengladeŝ - povas naski esceptajn malsategojn. Ja la rapidega homkvanta kreskado en iuj globregionoj estigas dramajn ekologiajn malekvilibrojn. Sed la radiko de la malsato estas antaŭ ĉio struktura kaj politika, kaŭzita de senkompata sistemo de ekonomia ekspluatado. Hieraŭ la koloniantoj forpelis la indiĝenojn el iliaj grundoj por tie kreskigi la poreksportajn kulturojn : arakidon, kafon, kotonon, sukerkanon - malprofite al la pornutraj kulturoj. Nun la gravaj plurnaciaj nutromerkataj societoj kondutas apenaŭ malsame por disvastigi la kulturojn de manioko kaj sojo.*

*Tiel la ekonomioj de multnombraj triamondaj landoj dependas de dubeŝancaj eksportadoj de kelkaj bazaj agroproduktoj, el kiuj unu aŭ du reprezentas foje pli ol 50 % de ilia eksterlanda komerco, dum la disvastigo de la pornutraj kulturoj, ofte restigitaj sur la plej malbonaj grundoj kaj objekto de malmultaj antaŭzorgoj, ne sukcesas sekvi tiun de la homkvanto. Ĉu oni*

*sufiĉe scias, ekzemple, ke de 1971 ĝis 1973, jaroj de la granda sekeco en Sahelo, la nutra valoro pri proteinoj kaj kalorioj, de la sumo de la eksportitaj arakidoj estis superaj al tiu de la importita nutra helpo !*

*La konkludo de tiu kritika analizo estas do absoluta : Same kiel la bonkoreco neniam ebligis restarigi la socian justecon, same la nuna prinutra helpo ne kapablos malaperigi la malsaton. Alia klopodo estas necesa.*

*IBID.*

## MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO

Organismo naskita de la ĵus signitaj konstatoj, la MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO ĝuste provas novan klopodon. La originaleco de MFSKM venas de malsama kompreno pri la problemoj. Fakte temas :
- favori fare de la loĝantaroj la memregadon de ties nutra produktado por atingi memsufiĉon.
- pliampleksigi la responsan senton de la individuoj kaj komprenigi al ili, ke ĉiu el ili estas ĉenero de la tutmonda solidareco.

El tiuj du ideoj elfluas logike ĝia naturo kaj ĝia funkciado :
- **inspirita de la mutualismo,** ĝi estas asocio, en kiu ĉiu homo estas konsiderata kiel egaleca partoprenanto, tiel por la kontentigo de siaj vivtenaj bezonoj, kiel por la reciproka koopera helpo.
- **Ĝin konsistigas** ĉiuj individuoj, ĉiudevenaj, dezirantaj partopreni la mondan solidarecon.
- Per subvencioj kaj seninterezaj pruntoj, **ĝi financas** la evoluigendajn projektojn, ĉefe kolektivajn, ligitajn al nutraja produktado por loka aŭ distrikta konsumado. Ĉiu aliĝinto rajtas proponi projektojn.
- **La propraj monrimedoj** de la Fonduso rezultas el :
  * periodaj pagoj de la aliĝintoj. La jara minimumo

ekvivalentas al taga nutraĵporcio.
* donacoj kaj subvencioj, kondiĉe ke ili estu neniel trudaj.

MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO devenas de la triobla pripenso MUTUALISMA, FEDERACIISMA kaj TUTMONDISMA. Tiu triobla elekto certigas la koherecon inter la VERAJ KIALOJ de la mondmalsato kaj la proponataj SOLVOJ.
MUTUALISMA, ĉar la mutualeco demokratie esprimas la solidarecon. Ĉiu projekto okazigas solidarecan kontrakton, en kiu la reciprokaj devontigoj estas klare difinitaj.
FEDERACIISMA, ĉar federacii estas **kunigi sen samigi** : Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato estas organizata laŭ homogenaj regionoj sin mem administrantaj, ĉiu pluigas siajn apartaĵojn, sian originalecon.
TUTMONDISMA, ĉar la nuntempaj plagoj estas tutmondaj kaj **tutmonda problemo** necesigas **tutmondan solvon.**

Monda Fonduso de Solidareco ignoras la landlimojn, sin malfermas al ĉiu individuo deziranta partopreni en la monda solidareco kaj sin lokas nur sub la juĝorajton de la **KONGRESO DE LA POPOLOJ**, ununura asembleo transnacie kaj demokratie balotelektita je planeda skalo.

-------

Laŭvole, oni povos havigi al si ĉiujn necesajn precizigojn ĉe M.F.S.K.M., c/ "Citoyens du Monde", 15 rue Victor Duruy, F- 75015 PARIS.

## BROŜUROJ DISPONEBLAJ ĈE SAT-BROŜURSERVO

Adreso : Esperanto, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE

| Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj) | Prezo en FF |
|---|---|
| Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand) | 4 |
| AA. La Aperoj de Ahasvero (Han Riner) | 20 |
| AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR) | 6 |
| AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka) | 3 |
| AP. Amo per proverboj (Azevedo) | 1,50 |
| BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski) | 20 |
| BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo) | 15 |
| BU. La racia kaj ateista budhismo | 4 |
| ĈI. Ekologio : ĉu ideologio ? (W. Günther) | 3 |
| ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti) | 6 |
| DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio | 25 |
| EA. Esperanto in 24 pages (angla) | 1 |
| EB. Esperanto de Base (2 folioj) | 1 |
| EL. Elekto de tekstoj de Bakunin | 10 |
| ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin) | 12 |
| ET. Etiko I (Kropotkin) | 12 |
| EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) | 4 |
| FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo | 4 |
| FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgois) | 45 |
| FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgois) Esp./Fr. | 8 |
| FZ. Filozofio Zoologia (Lamark) | 20 |
| GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne) } kune... | 12 |
| GR. Grammaire & Esperanto (Lentaigne) } kune... | |
| HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis) | 3 |
| IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ) | 5 |
| IM. Individuista Manlibreto (Han Riner) | 4 |
| IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky | 2 |
| JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio | 35 |
| KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais) | 15 |
| KB. Kie brulas, ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski | 18 |
| KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure) | 4 |
| KE. La Kvina Evangelio (Han Riner) | 15 |
| KI. El la kara infaneco... (Valo) | 12 |
| KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl | 5 |
| KV. Kvardek paŝetoj al plua posedo (legolibro) | 10 |
| LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr. Lanti | 20 |

LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937) 45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker) 15
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano 18
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon) 4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre) 6
MS. Memvola Servuto (La Boétie) 4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes) 10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse) 8
NC. Naciismo (Lanti) 12
NI. Nia Individuismo (E. Armand) 4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak) 3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman) 35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj) 15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta
+ Esprimoj sankciitaj de l'uzado (Bourgois) 12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval) 3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.) 8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral) 30
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero) 4
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin) 6
RE. Rezolucioj de la kongreso de St Imier (A.I.T.) 3
RO. Rompoj (A.Jacquard) 4
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo) 12
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval) 3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek) 4
ŜG. La Ŝtona Gasto (Michel Duc Goninaz) (teatraĵo) 5
TC. Por tutmonda civitismo (A.Gaymard-Rollet) 20
TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj 25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano 20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak) 3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts) 10
VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio
Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge) 20
VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj
ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946) 20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti 20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj
registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!) 7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel) 4

La afranko estas inkludita ekde 120-franka mendo.
Ĝiri al pĉk nº3371 74 M Bordeaux je nomo :
Cercle amical esp. agenais

**Presis : Baudé, F 47470 Beauville**